


INTERNACIA  
PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

**Redaktoro:**

Jozefo Németh

**Viceredaktoro:**

Katalin Kováts

**Kunlaborantoj:**

Birke Dockhorn

Boo Mee Kim-Lindblom

Stefan MacGill

Bill Maxey

Monika Molnár

Atilio Orellana Rojas

Blazio Vaha

## ENHAVO

Iván BUIJDOSÓ: Lernmaterialoj enplektitaj en rakontojn...	1
Kiel mi instruas Esperanton per Cseh-metodo (LIU XIAOJUN)	7
Intervjuo kun S. Bourot kaj G. Lagrange (Katalin KOVÁTS)	12
Pri E-lerniloj	14
Gvidataj 8-uloj (smg)	14
T-T-T-Trovu pasportajn ekzercojn (Stefan MACGILL)	16
Juna Amiko – Eterna juna (smg)	16
Kolker: Vojaĝo en Esperanto-lando (recenzo de Blazio VAHA)	17
El la landoj kaj sekcioj (AU, AT, FI, NL, PL)	26
Pri aranĝoj	32
36-a ILEI-Konferenco en Örestrand, Svedio (informoj, mendilo)	32
35-a Internacia Infana Kongreseto en Lerum, Svedio (MACGILL)	35
Metodika seminario en Čačak, Jugoslavio (informoj)	36
Redaktora noto	36

## ESTRARO DE LA LIGO

**Prezidanto:** Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione, Università Roma Tre, Via Castro Pretorio, 20, IT-00185 Roma, Italio. Tel. (+39) 06 44 62 092 aŭ 06 49 57 805, fakso: (+39) 06 49385673. <latorre.mauro@uniroma3.it> (nova adreso!); <http://il.uniroma3.it>  
*Kunordigado, rilatoj kun E-organizoj.*

**Vicprezidanto:** Stefan MacGill, Pannonia u. 30 / I / 6, HU-1136 Budapest. (nova adreso!) Tel. (+36 1) 349-5207 <stefan.macgill@galamb.net>  
*Eldona agado (inkl. periodaĵojn).*

**Sekretario:** Agneta Emanuelsson, Carl Ugglas v6, SE-641 37 Katrineholm, Svedio. Tel. (+46 150) 52387 kaj (+46) 708152387 (mesaĝoj). <agneta.emmanuelsson@liberal.se>  
*Membraro, sekcioj, komitato.*

**Vicsekretario:** (vakas!)

**Estrarano pri financoj:** Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge. Tel./fakso: (+46 8) 777 4175, <boomee.kimlindblom@swipnet.se>

**Estrarano:** Radojica Petrović, Bul. oslobođenja 36/14, YU-32000 Čačak, Jugoslavio. Tel. (+381) 32 371053, (oficeja) (+381 32) 302738. Fakso: (+381 32) 342101 <radp@ptt.yu>  
*Lernejaj projektoj, universitata agado.*

## Lernmaterialoj enplektitaj en rakontojn en la instruado de Esperanto

*BUIJDOSÓ, Iván – scienca helpkun-laboranto de ELTE, Katedro Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko, Esperanto-fako – prelegis en la Kongreso de la Asocio de Hungaraj Aplik-lingvistoj en la Sekcio Aplikata Lingvo-pedagogio, 26-28.03.2002, urbo Szeged. Jen la prelego senigita de la detaloj konataj al esperantistoj.*



### 1 La periodoj de la instruado de Esperanto

En tiu ĉi studo mi analizas la historion de la instruado de Esperanto. Mi ŝatus demonstri, ke *en la sukcesaj metodoj komuna trajto estas la rakontado.*

Mi dividus la historion de la instruado de Esperanto en tri periodoj, kiuj estas akceptataj ĉe la divido de la literaturo de Esperanto.

### 2 La unua periodo: ideo por la mondo

#### **2.1 La lernado de Esperanto en la komencaj jaroj**

En la unua periodo ne montriĝis problemoj la metodo de lingvolernado. Tio sekvis el la koncepto, ke Esperanto estas alproprigebla por la edukitaj homoj per malmulte da lernado, ĉar ĝi estas hindeŭropa lingva modelo. Tio koncernas la gramatikon, la vortojn. Oni koncedis, ke la vortkreado bezonas praktikadon. Zamenhof, la inicianto de la lingvo kredis tion. En la Ekzercaro krom la ĉiutagecaj frazoj 'leono estas besto' ni trovas rakontojn pri feino. Zamenhof konsciis pri la graveco de literatureskaj rakontoj.

#### **2.2 Kiel lernis Esperanton la sciencistoj de multaj lingvoj?**

Estis tipe, kiel ellernis Esperanton la hungara kemiisto KORACH Mór, akademiano. Li rakontas, ke en 1913 li estis universitata asista profesoro

en la universitato de Padua (Padova) en Italio. Laŭ propono de lia profesoro ili ambaŭ lernis Esperanton dum kelke da semajnoj kaj ili ekzamenis sin reciproke. Ili publicis ankaŭ Esperante en revuo pri kristalografio, kiun la profesoro redaktis. Ili aldonis al ĉiuj numeroj la vortaron kaj la gramatikon de Esperanto.

### **2.3 Lingvoperado kaj lingvolernado en la unua periodo**

En la unua periodo la lingvoperanto estis la skribita teksto, la lingvolernado okazis laŭ ekzemploj, la karaktero estis reprodukta-respegula.

## **3. La dua periodo: la provo de la ideo**

### **3.1 Novaj rolantoj en la lingvolernado**

Post la unua mondmilito ŝanĝiĝis la situacio. La lernantoj venis ne nur el la elito scianta multe da lingvoj, sed estis simplaj laboristoj, oficistoj. En multaj kazoj la instruistoj ne povis kalkuli pri la scio de bazaj gramatikaj kategorioj flanke de la lernantoj. La lernantoj lernis la lingvon kiel la unuan fremdan lingvon.

### **3.2 La Cseh-metodo**

Tiam komenciĝis la sukcesa aplikado de la rekta metodo, konata kiel Cseh-metodo. Ĝiaj karakterizaĵoj: la instruisto parolas nur Esperante, li uzas relative malmulte da vortoj kaj li enkondukas la gramatikon laŭpaŝe. Por garantii la principon, ofte eksterlanda estis la instruisto. La avantaĝoj de la rekta metodo: tuja paroligo, instigo, ke la parolo okazu en la lernata lingvo. La iniciatinto de tiu metodo, CSEH András, fondis Instituton en Nederlando por flegi la metodon kaj ĝi eĉ hodiaŭ funkcias.

#### **3.2.1 La tekniko de la Cseh-metodo**

En la Cseh-metodo la instrumaterialo estas dividita en 264 paŝoj. La instrumaterialo estas plene ellaborita, ĉio, kion la instruisto diras, estas skribita (Cseh, 1929). Ĉe ĉiu unuopa parto estas aparte montrite, kio estas tiam lernigenda. Ni rigardu, ekzemple, la partojn 118, 119 kaj 120. Tie la celo estas lernigi, ekzercigi la adverbon 'ankaŭ'. La rakonto portanta tiun ĉi celon estas: letero enhavanta amkonfeson, respondo kun la sama enhavo, edziĝpropono, traktado pri la doto.

### **3.3 La lingva konscio**

La propreco de la Cseh-metodo estas, ke ĝi instruas ankaŭ gramatikajn konceptojn. Ĝi klopodas gvidi la lernantojn, ke ili mem trovu la solvon de la gramatikaj problemoj, konstatu la regulojn. La instruado de la gramatiko estas pravigebla, la lernanto ja ricevas ilon, per kiu li povos plivastigi siajn sciojn. Elformiĝos lingva konscio, kono pri scio. Tio estas tre grava pro la speciala propreco de Esperanto. Tiuj parolas Esperanton bone, kiuj kapablas formi novajn vortojn dum la parolado. En Esperanto oni ne nur el pretaj vortoj formas frazojn, sed laŭ la dezirata direndo ni kreas vortojn priskribantaj la celatajn objektojn, fenomenojn. En Esperanto la aplikadon de tia dumparola vortkreado limigas nur la kompreneblo, ĉar ĉio estas bona, kio estas logika.

#### **3.3.1 Eksperimento pri la efiko de Esperanto al la lingva konscio**

Eksperimento estis farita en Italio kaj montris la sekvajn rezultojn (Pinto, M.A. & Corsetti, R., 2001:67-84). Grupo de 50 lernantoj lernis Esperanton, la kontrola grupo konsistanta el 68 lernantoj ne lernis ĝin. La membroj de la du grupoj venis el la sama kultura-intelekta ĉirkaŭaĵo: loĝantaj en la periferio de Romo, laŭstature submezklasaj. La eksperimenta grupo atingis pli altajn poentojn ol la kontrola grupo en la metalingvaj esploroj testantaj pri:

- sinonimo
- dusencaĵo
- gramatika rolo
- fonem-segmentado.

#### **3.4 La lernolibro-romano**

Oni povas preni kiel varianton de la Cseh-metodo, la lernolibro-romanon. Bona ekzemplo estas la romano de Julio Baghy: La verda koro (Baghy, 1982). La scenejo de la romano estas Siberio. En la romano estas amikeco, amo, tragedio. Ĝi estis verkita kun strebo al literaturo. La vortprovizo en la opaj ĉapitroj estas severe limigita, la uzataj afiksoj kaj gramatikaĵoj estas enkondukitaj nur laŭpaŝe. La lernado el tia materialo ebligis la plej oportunan manieron: la lernemuloj renkontiĝis regule ĉe scianto de Esperanto kaj ili legis kaj priparolis unu ĉapitron. Ili post tri monatoj jam havis bonan parolkapablon en Esperanto (Laŭ la afabla informo de FAJSZI Károly). La Cseh-metodo bezonis instruiston kun aktora kapablo, tiu ĉi metodo bezonis nur unu fervoran esperantiston.

### 3.5 La literaturo kiel ekzercotereno

La ĉefa agado de la Esperanto-movado inter la du mondmilitoj moviĝis al literatura tereno. Kvankam estis pozitiva la raporto de la asista ĝenerala sekretario de la Ligo de Nacioj pri la instruado de Esperanto, anstataŭ celhava traktado oni transdonis al komisiono la demandojn pri enkonduko de Esperanto. La intereso de esperantistoj turniĝis al la literaturo unue por demonstri la taŭgecon de la lingvo, due por kontentigi la bezonojn de la parolantoj.

### 3.6 La lingvoperado kaj la lingvolernado en la dua periodo

La lingvoperanto estas la instrumaterialo kaj la homo respektive. Tiuj kreas ĉirkaŭaĵon, el kiuj estas rekonebla la komunikada intenco kaj el ĝi oni povas eltiri la lingvan materialon. Tia alproprigo havas respregulan-krean karakteron.

## 4 La tria epoko: teorio kaj praktiko

### 4.1 La teknikaj rimedoj, la evoluo de la lingvoinstrua teorio

La lingvoinstruado post la dua mondmilito fariĝis amasa. Ankaŭ la teknikaj kondiĉoj de la lingvoinstruado ŝanĝiĝis. Aperis teknikaj rimedoj: sonregistrado, bilda prezento kaj komputilo ebligis la registradon kaj la reuzon de la lingva scio de la instruisto, kontraste al la ĝistiamaj metodoj baziĝintaj sur la scio de la instruisto kaj skribo.

#### 4.1.1 La aktuala situacio

Ni posedas multajn rimedojn por instrui Esperanton. Sen celi kompletecon mi listigas kelkajn:

- 70-mil vorta hungara-Esperanta vortaro en presita kaj en diĝita formoj.
- La firmao *Transparent Language* pretigis instru-programon por Esperanto. Ĝi estas tia, kia estas programo por iu el la aliaj 101 lingvoj.
- Oni povas aĉeti la E-version de *Mazi* de BBC. Oni aplikas ĝin multloke.
- Pretiĝis la vidbenda instrumaterialo Esperanta: '*Esperanto, pasporto al la tuta mondo*'.
- Ekzistas komputila Leksikono en Interreto.
- Ekzistas libere pliampleksigebla enciklopedio en Interreto.

– Ekzistas hejmpaĝaro pri la edukado en E-o. Ĝi ebligas, ke lerngrupoj el la tuta mondo kontaktu unu la alian, ili diskutu pri temoj difinitaj de tempo al tempo. Ĝi ebligas, ke instruistoj pridiskutu siajn metodojn.

### 4.2 La rolo de la lingvoinstruisto

La teknikaj rimedoj do ebligas, ke ni ricevu preta tion, kion niaj antaŭuloj devis produkti per multe da mono, tempo kaj peno. Nun jam ne estas limigo la malproksimeco. Ĝis nun la lernmaterialoj sufiĉe kostis, sed nun jam oni povas produkti ilin propramane. La kurson de bona instruisto oni povas registri sur sonbendon aŭ vidbendon kaj per ĝi oni povas multe pli efike lerni. Kio do estu nia instrua strategio en tiu ĉi situacio? Kiuj estas la veraj bezonoj, kiujn ni devas kontentigi? La emfazo nun estas sur la bezonoj de la individuo.

### 4.3 Kion bezonas la lingvolernanto?

- memevoluiĝo (personevoluiga efiko de la lingvoscio)
- informakiro (ekono de vivmanieroj, turismo)
- komunuma travivaĵo (kongresoj, kluboj)
- scienca agado (fakaj konferencoj ekzemple kadre de AIS)

La hungaria situacio estas speciala, nome ĉe ni Esperanto povas esti studobjekto de la abiturienta ekzameno, ĝi alportas kelke da plusaj poentoj en la priakcepta ekzameno de superaj lernejoj, ĝi estas multloke akceptata por plenumi la postulon de diplomiĝo aŭ kandidatiĝo. Tiel Esperanto fariĝis parto de nia socia vivo.

### 4.4 La instrua ĉirkaŭaĵo farita de la tekniko

En la nova situacio jam ne la instruisto diras al la lernanto, kiel alproprigi la lingvon, sed mem la lernanto povas zorgi pri sia lingvolernado. La rimedoj menciitaj permesas, ke la lernanto reguligu la informojn alfluantajn al ŝi/li. Oni povas haltigi la magnetofonon, registri la lingvolecionon kaj poste pli atente aŭskulti la parolon de la instruisto. Aŭ oni povas mem elekti el Interreto, kio estas interesa en tiu momento.

### 4.5 La rakonto estas motiviga rimedo

Oni povas kunvivi kun la rolantoj de iu pretende verkita rakonto, la rolantoj donas sian ĉirkaŭaĵon. Oni volonte relegas la rakonton, tiel oni povas akiri pli bonan scion.

#### 4.6 La lingvolernanto estas la ĉefrolanto de sia historio

Eble rakonto fariĝas la plej interesa, se la lernanto enmetas en ĝin sian propran vivhistorion. Nun tie ĉi mi parolas pri la rakonto en larĝa senco. Ni prenu tiel la rakonton, ke la lernanto mem verkas sian vivhistorion.

##### 4.6.1 Unua rakonto: lingvolernado, interamikiĝo, vojaĝo

La babila kanalo donas tian eblon. Mi konigas unu el la sukcesa programo:

- komenco de lingvolernado en aprilo, kontakto kun alilandaj esperantistoj post kelke da tagoj
- en somero junulara tendaro (ne lingvotendaro!)
- tradukado de la ŝatata romano en Esperanton, poste por kontrolo oni povas rigardi la tradukon en la reto
- ĉiutaga babilado en Interreto kun la amikoj akiritaj en la tendaro
- en novembro sukcesa supera ŝtata ekzameno

Mi aldonas al la vera historio, ke estas speciala metodo kiel lerni en Interreto. Tion la instruisto ja devas apliki. La avantaĝoj, kiujn la babila kanalo donas en Interreto: laŭdezira eniĝo en la komunikan procezon, la envenanta informo ne estas tro rapida kaj estas reguligebla, oni povas fari komunan celon kun la interparolanta partnero, ktp.

##### 4.6.2 Dua rakonto: Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo

Oni povas ofte legi en la Esperanta gazetaro, ke iu entreprenas tuteŭropan aŭ ĉirkaŭmondan vojaĝon kaj serĉas gastigantajn lokojn pli malpli konvenajn al la planita vojo. La vojaĝantoj poste raportas pri siaj travivaĵoj, kie ĝuste ili estis, kion ili faris. La lingvolernantoj povas sekvi tiujn rakontojn, kio donas tre bonan motivon por lerni la lingvon.

#### 4.7 La lingvoperado kaj la lingvolernado en la tria periodo

La lingvoperanto estas mem la realo. La rolo de la instruisto estas kapabligi la lernanton uzi la akireblajn fontojn. La lingvo-alproprigado estas mem la partopreno en la praktiko.

## 5 La dezirata lingvoscio

Sekve, do, konturiĝas la dezirata lingvoscio kaj la lingvolernado konforma al ĝi en la diversaj epokoj. Ni povas resumi jene:

**5.1 Respegula-reprodukta.** Oni lernas laŭ ekzemploj. Oni instinkte rekonis la veran proprecon de Esperanto, la gravecon de la kombinado de liberaj morfemoj, oni klopodis pri ĝia montrado.

**5.2 Respegula-krea.** La instruistoj eksplicite instruas, ekzercigas la kombinadon de la memstaraj morfemoj.

**5.3 Praktikado.** La transpreno de la pozitivaj trajtoj de la pli fruaj metodoj. En la praktiko mem la lernanto povas difini sian lernan strategion, povas reguligi la instruan fonton. Tiel oni akiras la aktivajn frazkrean kaj vortkreaĵojn necesajn por la plua evoluo. Se ni volas kompari tiun kapablon kun la rezultoj akiritaj de aliaj fremdaj lingvoj, ni povas konstati, ke lernanto post la alproprigo de relative malmulte da vortoj ricevas eblon de altnivela produkta kapablo.

### Literaturo

- Baghy, Julio (1982). La verda koro. Budapest: HEA.
- Cseh, Andreo (1929). Baza Cseh-kurso. Den Haag: IEI, 1992 (8-a eldono).
- Pinto, M.A. & Corsetti, R. (2001). Imparare l'esperanto e migliorare le capacità di riflettere sull'italiano. Un'esperienza al livello dei scuola media. Roma: Rivista di psicolinguistica applicata, 2001/2.

## Kiel mi instruas Esperanton per Cseh-metodo

de Liu Xiaojun

Mi unuafoje aŭdis pri Cseh-metodo en la E-kurso kiam mi lernis nian lingvon en Beijing en la jaro 1981. Nia estimata instruisto, Li Shijun diris al ni ke la Cseh-metodo estas tre bona por instrui E-on, kaj se ni instruos Esperanton, ni apliku tiun metodon. Dum sia instruado sinjoro Li mem montris al ni kiel praktiki tiun metodon kaj donis al ni tre bonajn kaj interesajn ekzemplojn.

Kiam mi komencis mian E-instruadon en nia universitato (Shandong, Ĉinio) mi provis uzi Cseh-metodon kaj dank' al tiu metodo mia instruado de Esperanto sukcesis. Mi jam instruas nian lingvon ekde

pli ol dudek jaroj en la universitato, la praktiko pruvis ke la Cseh-metodo estas tre bona kaj efika metodo. Multaj gestudentoj alproprigis E-on ene de mallonga tempo. Post tridek horoj da lernado ili povis legi simplajn Esperantajn legaĵojn, konversacii per facilaj vortoj, skribi leterojn por amikiĝi kun lernantoj de diversaj landoj kaj esprimi siajn pensojn. Ili ekamis Esperanton, volis fariĝi esperantistoj kaj daŭre lerni Esperanton kaj labori per kaj por Esperanto. Mi trovas ke ni devas propagandi la Cseh-metodon kaj eduki instruistojn de Cseh-metodo, tiel oni povos efike instrui nian lingvon kaj ricevi pli grandajn sukcesojn en la instruado de Esperanto.

Kiel mi instruas Esperanton? En la komenco de mia instruado mi ne donas librojn al la gelernantoj kaj nur alportas objektojn en la klason kaj montras al gelernantoj kaj demandas de ili: *'Kio estas tio? Tio estas libro. Kio estas tio ĉi? Tio ĉi estas krajono. Tio estas gazeto, tio estas foto, tio estas plumo ktp...'* Vidante tiujn objektojn la lernantoj konas la vortojn. Kiam ili povas diri tiujn vortojn, mi skribas la vortojn sur la tabulon kaj legigas ilin. Tiamaniere la lernantoj tre facile memoras la vortojn kaj ili povas facile paroli per Esperanto. Sekve mi montras al ili objektojn en la klasĉambro kaj lernigas la lernantojn paroli per objektoj. Tia instruado interesigas la lernantojn kaj ili tre ŝatas lerni kaj paroli, la atmosfero de la klasĉambro estas vigla kaj preskaŭ ĉiuj lernantoj parolas, ili memoras multajn vortojn kaj povas diri multajn frazojn.

Mi instruas ne nur per objektoj, sed mi instruas al la lernantoj ankaŭ la gramatikon de Esperanto. La gramatiko de Esperanto estas simpla kaj regula, do mi donas al la lernantoj kelkajn modelojn, kiuj faciligas la faradon de la Esperantaj frazoj. Ekzemple mi donas al la lernantoj la fraztipojn kiel: --- o estas --- o (*patro estas laboristo*); --- oj estas --- oj (*laboristoj estas junuloj*) aŭ --- o estas --- a (*patrino estas ĝentila*), --- oj estas --- aj (*amikoj estas kontentaj*). Per tiaj fraztipoj la lernantoj povas facile ellerni multajn frazojn kaj scipovas fari multajn aliajn frazojn.

Estas tre interese, ke la vortfarado de Esperanto tre-tre similas al la vortfarado de la ĉina lingvo. Ekzemple: en la ĉina lingvo 井 (puto) kaj 水 (akvo) povas esti kunmetitaj kaj fariĝas nova vorto 井水 (putakvo); inverse 水 (akvo) 井 (puto) ankaŭ povas esti kunmetitaj kaj fariĝas nova vorto 水井 (akvoputo); 牙 (dento) kaj 膏 (pasto) povas esti kunmetitaj kaj fariĝas 牙膏 (dentpasto), ankaŭ 牙 (dento) kaj 刷 (broso) povas esti kunmetitaj kaj fariĝas 牙刷 (dentbroso).

Pro tio ĉinaj lernantoj tre interesigas pri la vortfarado kaj ili volas fari novajn vortojn. Tial mi ĝin prezentas al ili en la komenco de la lernado, tio interesigas ilin kaj ili ne trovas ke Esperanto estas fremda, ili sentas ke Esperanto estas samfamilia al la ĉina lingvo.

[La lasta foto pri Andreo Cseh, el la jaro 1979, kelkajn tagojn antaŭ lia morto.]



Mi pensas ke la spirito de Cseh-metodo estas, ke la instruisto devas faciligi kaj interesigi la lernadon de Esperanto, la gelernantoj sentu, ke Esperanto ne estas malfacila kaj ke ili povas tre facile ellerni kaj facile uzi ĝin. Tial instruisto devas igi la lernadon interesa. Por tio mi instruas kantojn, poemojn, ludojn al la lernantoj dum la instruado. Ekzemple, kiam mi instruas la u-modon, mi instruas al la lernantoj la kanton *'dancu, dancu, ni ronde malpeze, ne faligu la fornon en meze .....'* en nur unu frazo estas tri u-modoj. Per la kantado la lernantoj ellernas tiun modon kaj povas uzi ĝin.

Kiam mi instruas la prepoziciojn *por-pro*, mi instruas al la lernantoj la poemon *'Verda stelo, verda stelo, vi naskiĝis por l'espero; verda stelo, verda stelo vi naskiĝis por la paco pro via naskiĝo la mondo pleniĝis de amikeco, pro via naskiĝo la mondo pleniĝis de amo ...'* Kiam la gelernantoj povas laŭtlege tiun poemon, tiam ili jam tre bone distingas la du prepoziciojn, komprenas la signifon de la prepozicioj kaj povas uzi ilin.

Kiam mi instruas la kvar sezonojn, mi instruas japanan popolan kanton *'Kanto de kvar sezonoj': Jen printempon amas vi ... Jen someron amas vi ... Jen aŭtunon amas vi ... Nu jen vintron amas vi ...'* Tiel kantante la lernantoj lernas ne nur multajn vortojn, sed ankaŭ multajn belajn frazojn pri la sezonoj.

La instruisto povas uzi ankaŭ ludon, ankaŭ tio estas tre bona metodo por instruado, ekzemple, kiam oni instruas la numeralojn, oni povas fari ludon kiel: peti la lernantojn diri laŭvice unu post la alia numerojn: unu, du, tri, kvar ... sed ne diri sep aŭ iun ajn ciferon, se iu lernanto forgesas la

regulon kaj eldiras tiun malpermesitan numeron, oni ordonas al li prezenti programeron, kanti aŭ danci, kio interesigas la gelernantojn fari ekzercojn pri la numeraloj kaj tiel ili povas tre bone regi ĝin.

Mi opinias ke la instruado de Esperanto ne ricevis bonan rezulton, la kialo estas ke niaj lernantoj ne posedas la lingvan medion. Por lerni la lingvon, la lingva medio estas tre grava, nur parolante oni povas mastri la lingvon. Ĉar mankas al ni la lingva medio por lerni Esperanton, ni mem devas fari Esperantan lingvan medion al niaj lernantoj. Do mi algluis malgrandajn paperojn kun Esperantaj vortoj al ĉiuj objektoj en la klasĉambro: tablo, tabulo, seĝo, muro, pordo, fenestro, lampo, skribilo ... tiel kiam la lernantoj rigardas tiujn objektojn ili havas la vortojn antaŭ la okuloj kaj ili povas memori ilin, ili povas iom post iom diri multajn frazojn kaj ili ŝatos ekparoli Esperante. En nia universitato E-kurso funkcias nur unufoje en ĉiu semajno, krom la E-kurso, la lernantoj ne havas okazon paroli Esperante, pro tio kiam mi renkontas lernantojn de E-kurso, mi ĉiam salutas ilin Esperante, tio kuraĝigas ilin kaj ankaŭ atentigas aliajn lernantojn, ofte ili demandas al Esperantaj lernantoj, kiun lingvon vi parolas kun via instruisto? Laŭ mi, la plej bona maniero por propagandi E-on estas la uzado de Esperanto.

Mi vidis ke iuj esperantistoj propagandis E-on, sed ili ne parolas Esperante nek uzas ĝin. Tiel kiuj volus lerni nian lingvon? Kiel oni kredus ke Esperanto estas vere utila? Mi opinias ke unufoja uzado estas milfoje pli efika propagando ol centfoja parolado pri la utileco de Esperanto. Ni, esperantistoj, precipe instruistoj de Esperanto devas kredi aliajn per nia agado de Esperanto. Pura propagando ne povas konkeri homojn, sed unu reala agado povas ŝanĝi opiniojn de aliaj.

Mia instruado de Esperanto ricevis evidentan kaj bonan sukceson. En Shandong Universitato mi funkciigas E-kurson jam pli ol dudek jarojn. Ĉiusemestre mi instruas 30 ĝis 35 horojn, du horojn ĉiusemajne. Post unu lerno, t.e. pli ol 60 studhoroj, gestudentoj jam povas interparoli Esperante kaj legi originalajn romanojn de Esperanto, iam ili povas traduki simplajn artikolojn kaj verki simplajn disertaĵojn.

La studentojn, kiuj volas daŭre lerni nian lingvon, mi lernigas per "Krestomatia de Esperanto", "Faktoj kaj Fantazioj" aŭ kelkaj artikoloj elektitaj el "ESPERANTO", "Kontakto", "Monato", "Literatura Foiro" ktp. Mirinde estas ke dum tia lernado gestudentoj ne renkontas multajn malfacilaĵojn. Ili povis facile legi kaj ĉinigi tekstojn, kiaj «Patra Amo» de Julio Baghy, « En Ĉinio Batalanta» de Verda Majo, «Bela» de M. J.

Lermontov, «La Sankta Biblio», «Parolado de Zamenhof» kaj tiel plu.

La plejparto de miaj gelernantoj lernas Esperanton kiel nedevigan lingvon. Tiel unujara lernado de Esperanto jam sufiĉas, ĉar miaj gelernantoj jam lernis la anglan lingvon kiel la unuan lingvon dum ses aŭ sep jaroj. Do Esperanto al ili ne estas tre malfacila. Post unu jaro da lernado, ili povas bone posedi E-on. Ili jam povas korespondi kun esperantistoj de aliaj landoj. Se iuj esprimas al mi ke ili volas daŭrigi la lernadon de E-o, tiam mi konsilas al ili legi Esperantajn librojn, korespondi kun eksterlandaj esperantistoj, eĉ mi konsilis al ili verki simplajn artikolojn por Esperantaj gazetoj kiel «Juna Amiko», «La Mondo» aŭ por lokaj organoj de E-Asocioj. Mi kuraĝigas ilin ne forlasi E-on kaj de tempo al tempo legi, aŭskulti, skribi aŭ verki per E-o. Tiel oni ne forgesas E-on.

En nia universitato, mi uzas precipe du librojn kiel lernolibrojn. Unu el ili estas «Esperanto» verkita de estimata sinjoro Pierre Janton, franca esperantisto. Mi ĉinigis tiun libron. La studentoj tre ŝatas tiun libron, ĉar ĝi prezentas la diversajn flankojn de Esperanto: lingvo de Esperanto, literaturo de Esperanto, movado de Esperanto... Traleginte tiun libron oni povas bone ekkoni E-on kaj ĝian gravecon por internacia komunikado. La dua lernolibro estas verkita de ĉina esperantisto. Kaj krom lernolibroj, mi uzas "Krestomatia de Esperanto" kaj aliajn tekstojn kiel instruajn materialojn. Mi pensas ke oni devas verki novajn lernolibrojn por niaj gestudentoj, ĉar la tempo pasas, aperas multaj novaj aferoj. La enhavo de nia Esperanta lernolibro jam ne konvenas al la nuna situacio. Se oni parolas pri la instruado de Esperanto, oni devas atenti ke la enhavo de niaj Esperantaj lernolibroj estas jam malnova. Mi ne konas la enhavon de Esperantaj lernolibroj de aliaj landoj, sed mi scias ke en Ĉinio jam pli ol dudek jarojn longe oni ne publikigis novajn lernolibrojn por ĉinaj lernantoj de Esperanto. Ĉu oni ne bezonas senĉese novigi la enhavon de lernolibroj por prosperigi la instruadon de Esperanto, samtempe por prosperigi Esperanton en la mondo?

Mi volas sincere interŝanĝi spertojn pri instruado de Esperanto kun ĉiuj instruistoj de Esperanto por ke ni povu kunlabori.

Liu Xiaojun

Shandong Daxue Waiguoyuueyuan, 250100 Jinan Shandong, Ĉinio  
sdea@china.com, miakara@sdu.edu.cn

## Ni demandis al ...

**Suzanne Bourot kaj  
Georges Lagrange,**  
la estroj de la programoj de  
**KVINPETALO**  
pri la agado kaj perspektivoj  
de la E-centro.



*Kio fakte estas Kvinpetalo?*

Ĝi estas la staĝejo, kulturcentro kaj studocentro de Societo Yvonne Martinot (SYM), troviĝanta en Francio, fondita en 1984.

*Kiuj estas la aktivadoj de la centro?*

Ĝi organizas staĝojn por instrui la lingvon Esperanto kaj pri diversaj aspektoj de Esperanta kulturo (historio de la movado, literaturo, ktp.) kaj ankaŭ staĝojn pri diversaj fakoj (ornitologio, joko, trikado, astronomio, piedmigrado, botaniko, ktp.) per Esperanto. Dum tiuj staĝoj, oni serioze laboras kaj multe lernas, oni konstante praktikas la lingvon en ĉiutagaj situacioj, sed eblas ankaŭ ripozi en kvieta kampara ĉirkaŭo kaj ĝui la familian etoson kaj bongustan kuirarton de la domo.

*Laŭ miaj scioj la loko taŭgas ankaŭ por altnivelaj studoj, ĉu ne?*

Kompreneble eblas prepariĝi kaj trapasi la oficialajn ekzamenojn de FEL, okaze de ekzamensesioj organizataj fine de certaj staĝoj. Estas eblo ankaŭ por esplorlaboroj. Kvinpetalo enhavas, krom sia propra ampleksa biblioteko, la librarojn postlasitajn de du elstaraj francaj esperantistoj: Gaston Waringhien kaj Roger Bernard. La libroj kaj diversaj dokumentoj estas konsulteblaj nur surloke.

Nia libroservo proponas al la staĝanoj la plej novajn eldonaĵojn. Ni organizas ankaŭ perkorespondan kurson kvarnivelan. La unua nivelo taŭgas por komencantoj, la dua por progresantoj. La aliĝintoj ricevas lecionojn kaj taskojn. La taskojn ili devas resendi por korektado.

*Kiom da kursoj vi havas jare? Kiuj estas viaj fidelaj kursgvidantoj? Ĉu la programoj estas popularaj nur en Francio aŭ ĉu vi havas ankaŭ eksterlandajn partoprenantojn?*

Ĉiujare ni organizas 15 staĝojn. Niaj fidelaj gvidantoj, kiuj re- kaj revenas, eĉ se ne ĉiuj ĉiujare, estas la sekvaj: Claude Gacond, Ed Borsboom, Marjorie Boulton, Michel Duc Goninaz, Janine Dumoulin, Arlette Phutniak, Philippe Pellicier kaj kelkaj aliaj...

Bonŝance ne nur la prelegantaro, sed ankaŭ la partoprenantaro estas sufiĉe internacia, ni havas gastojn el diversaj landoj kaj ne nur el Eŭropo.

*Kiel mi vidas, la centro signife riĉiĝis en la lasta periodo, pere de la novaĉetita domo grandiĝis la gastigkapacito de la centro. Kiom da partoprenantoj vi povas havi dum unu kurso-periodo?*



Post la renovigo niaj ebloj pli grandiĝis. Ni havas 6 unulitajn kaj 12 dulitajn ĉambrojn, do ni povas gastigi eĉ 30 partoprenantojn.

*La prezoj estas nekredible malaltaj, verŝajne vi havas ankaŭ ekster la kursperiodo vizitantojn, ĉu ne?*

Kelkfoje, sed ne ofte. La prezoj estas malaltaj, ĉar ni deziras ke ĉiuj povu partopreni staĝojn – eĉ se li/si ne havas multe da mono. Kompense pluraj staĝantoj krom la kotizoj donacas monon por helpi la centron.

*Mi mem plurfoje gvidis ĉe vi kurson kaj ĉiam admiris vian entuziasmon, senlaca zorgadon. Permesu al mi tamen mencii, ke tia laboro povas esti tre laciga kaj eble estus nun tempo zorgi pri*



*konstantaj kunlaborantoj, eventualaj daŭrigontoj de via altvalora laboro.*

Jes, tio veras. En la lastaj jaroj ni komencis serĉi anstataŭigontojn. Laŭ nia imago du tiaj personoj estas necesaj, kiuj estas finance sendependaj kaj entuziasmaj, ja la laboro estas senpaga. Ni tamen povas dum la tuta jaro disponigi loĝejon, renovigitan kaj komfortan kun ĝardeno, senpagajn hejtadon, elektron kaj akvon. Dum la staĝoj necesas zorgi pri la manĝoj, antaŭ la staĝoj pri la purigado de la dormoĉambroj kaj pri butikumado. Necesas ke niaj anstataŭantoj partoprenu staĝo(j)n por bone konscii pri la laboro.

*Mi sincere esperas, ke vi baldaŭ trovos helpantojn, eventuale daŭrigantojn de via laboro kaj ke vi povos iom ripozi post longjara deĵorado.*

Katalin Kováts

#### Interesiĝantoj kontaktu:

Suzanne kaj Georges en KVINPETALO Esperanto-Centro, FR-86410 BOURESSE. Telefono kaj faksilo: +33 (0) 5 49 42 80 74. Retadreso: [kvinpetalo@club-internet.fr](mailto:kvinpetalo@club-internet.fr). Informoj pri la centro troveblas ankaŭ en la TTT-paĝo: <http://hometown.aol.com/yannickdum/kvinpetalo.html>

## **pri E-lerniloj ...**

### **1) Gvidataj 8-uloj**

Aperis gvidilo por la lernilo *Okulo*, ambaŭ eldonitaj de ILEI por lernantoj de Esperanto inter 6- kaj 10-jaraj. La libreto por lernantoj estas plene Esperanto-lingva (sen naci-lingvaj klarigoj), do estas abunde ilustrita, kun pluraj plenkoloraj paĝoj. La heroo estas ok-forma gaja bubeto. Li kaj trupo da infanoj kun kurioza (sed didaktike utila) ekstertera monstro prezentas kaj ekzercigas vigran enhavon pere de armeeto da aktivaj kaj utilaj verboj. Enestas ankaŭ bildstria serio "Mira - Aventuroj de detektivo".

Por pli da informoj pri la lernanta kajero, vidu en IPR 99/4, p. 27. Pri tio kaj la gvidilo, rigardu la hejmpaĝon <[www.edukado.net](http://www.edukado.net)>. En ĝia „Lerniloteko” vi vidas normigitan priskribon, recenzon kaj specimenajn paĝojn. Komence la gvidilo prezentas resumon de ĉiu kajero-paĝo sub normaj rubrikaj: komunika celo, gramatiko, novaj vortoj (verboj, substantivoj, aliaj) kaj konsiloj por uzado. Tia gvido gravas por tiuj ne tiom kutimigitaj instrui per rekta komunikiga metodo, en kiu la paĝoj de la lernanta kajero prezentas nur la materialon, situacion kaj komencpunkton, kiun la instruisto devas ampleksigi. La plej granda parto de la gvidilo provizas praktikajn ekzercojn, ludojn, verkojn (poemojn, kantojn, kruc-enigmajn, kolorigendajn bildojn) en oportune fotokopiebla formo. Jen fonto de taskfolioj por produktive okupi klason. Fine estas respondoj al la ekzercoj kaj laŭpaĝa resuma tabelo de la lernanta kajero kopiebla sur unu A4-folio.

*Okulo, kajero 1, Stefan MacGill, ILEI, Budapest, 1999. Ilustris Mónika Molnár, 22cm, 44p.*

*Okulo, Gvidilo por kajero 1, ILEI, Budapest, 2002. 52p. ISBN 963 00 9802 4.*

Verkinto, ilustrinto, formato samaj kiel la lernanta kajero. La kajero kaj gvidilo havas saman prezon. Ĉe UEA, ILEI kaj aliaj libroservoj: 4,50 EUR, kun sesona rabato ekde 3 ekz. Ĉe UEA, aldonu sendokostojn. Ĉe ILEI sendokostoj inkluzivitaj. ILEI ofertas ambaŭ kajerojn kun triona rabato ekde 3 ekz. al libroservoj, propraj sekcioj kaj klasoj de Interkulturo, kaj kun rabato de 40% ekde 9 ekz.

Mendoj al IEI, Riouwstraat 172, NL-2858 HW Den Haag, Nederlando. Rete: <[iei001@tiscali.nl](mailto:iei001@tiscali.nl)> aŭ al

ILEI, Pannonia u. 30/II/6, HU-1136 Budapest, Hungario. (atentu, nova adreso!). Retaj mendoj: <[stefan.macgill@galamb.net](mailto:stefan.macgill@galamb.net)>. Mendojn tien sendu kopie al la kasisto de ILEI (v.p.2), ĉar dum la transigo tiu retadreso povos dumtempe ne funkcii.

#### **Aliaj titoloj haveblaj de la libroservo:**

- ✓ Tendaraj tagoj, kajeroj 2 kaj 3: po EUR 6,90<sup>1</sup>
- ✓ Fantaziaĵoj kaj Kantoj por Infanoj (Rømmesmo): EUR 3,60
- ✓ Vojaĝo en Esperanto-Lando (Kolker - unua eldono): EUR 9,60
- ✓ Ekzercoj al la Tuta Pasporto (Lec.1-4 de la vidbendo<sup>2</sup>): EUR 4,35.

<sup>1</sup> Gvidilo por la komenco de kajero 2 haveblas de <[www.edukado.net](http://www.edukado.net)>.

## 2) T-T-T-Trovu pasportajn ekzercojn

La vidbendo *Pasporto al la Tuta Mondo* havas akompanajn ekzercojn. Kelkloke, la ekzercoj por lecionoj 9-12 estis distribuitaj sen enkondukaj paĝoj. Tiuj estas nun rigardeblaj kaj surpaperigeblaj el la Tut-Tera-Teksaĵo. Tiuj enkondukoj resumas la rakonton de la koncerna leciono, kaj resume kaj laŭscene. Tio precipe utilas por instruistoj preparontaj lecionojn ĉirkaŭ la bendo. Ili krome klarigas la ĉefajn gramatikajn enhavojn de la lecionoj (-ig-, -igĝ-, la relativa uzo de *kiu* kaj resumo de la verbo-strukturo de Esperanto). Por vidi la paĝojn en formato Word, vizitu la hejmpaĝon <www.edukado.net> kaj serĉu 'Pasporto' en la rubriko Lerniloteke. Indas viziti tiun TTT-ejon ĉiuokaze: ĝi prezentas multajn lernilojn kaj invitas kontribuantojn por plue kreski.

Stefan MacGill

## 3) Juna Amiko – Eterne juna

*Juna amiko* eniras sian tridekan jaron de aperado en 2003, kun numeroj 104 ĝis 107. Ni anoncas pli simplan tarifaron. Unue, ni samigas la kostojn en eŭroj kaj dolaroj. Ni malpliigas la tarif-grupojn de tri al du. La landoj de tarifo 1 restas kiel antaŭe (Okcidenta Eŭropo, Nord-Ameriko, Japanio, Aŭstralazio), tarifo du validos por la ceteraj – la ĝisnunaj tarifzonoj 2 kaj 3. Daŭre Hungario havas apartajn tarifojn. Ni devas altigi la tarifojn pro forta kresko en la sendokostoj. Tio efikas ĉefe sur la landoj de la ĝisnuna tarifo 3. Por mildigi la altigon, ILEI akceptos abonojn por 2003 ĝis la jarfino laŭ la ĝisnunaj tarifoj. Ne ĉiuj perantoj prizorgos tion – petu vian. Se ne, vi povos pagi malnov-tarife rekte al la kasisto de ILEI. Eblas aboni pere de UEA aŭ trideko da landaj perantoj (listigitaj en la hejmpaĝo de JA). Nova varbilo ekzistas, kun la nova tarifaro:

	1 abono	2-4 ekz.	Ekde 5 ekz.
Tarifo 1	12 EUR/USD	po 8	po 6
Tarifo 2	6	po 5	po 4

<sup>2</sup> Por Lec 5-12 petu de ELNA.

Restas la kvantaj rabatoj. Krompago por prioritata (aerpoŝta) sendo: 30% *Juna amiko* indas! Dudek ok paĝoj da instigaj legaĵoj kvarfoje jare. Diskonigu pli vigle ĉi tiun servon de ILEI. Komprenigu al instruistoj kiel ĝi povos buntigi iliajn lecionojn. ILEI strebas ke la revuo aperu (kiel antaŭe) kiel pozitivaĵo en la ligaj financoj. Ni atendas multajn kaj fruajn abonojn por la nova jaro!

## 4) Lingvo kaj kulturo tra postkursa prismo (recenzo)

### Boris Kolker<sup>3</sup>: VOJAĜO EN ESPERANTO-LANDO

*Perfektiga kurso de Esperanto kaj Gvidlibro pri la Esperanta kulturo*  
*Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 2002*

La libro ampleksas 279 numerigitajn paĝojn, ISBN 92 9017 078 6. Redaktoro: Viktor Aroloviĉ. Grafiko: Francisco L. Veuthey. Tekst-prilaboro: Roy McCoy. Ilustra redakto: Osmo Buller. Presita ĉe Drukkerij Bariet B.V., Nederlando.

En la enkonduko la aŭtoro esprimas tre koran dankon al kunlaborintoj kaj helpintoj, inter ili al Viktor Aroloviĉ, Aleksandro Ŝevĉenko, Aleksandro Melnikov, Osmo Buller, Renato Corsetti, Kep Enderby, Roy McCoy, Rob Moerbeek, Trevor Steele, kaj Francisco Veuthey.

<sup>3</sup> Boriso (Boriŝ Grigorjeviĉ\*) Kolker (1939). "Rusiano kaj sovetiano, ekde 1993 – usonano. Instruisto de lingvoj kaj tradukisto. Doktoro pri lingvoscienco, defendinta disertacion pri esperantologia temo. Aŭtoro de tri Esperanto-lermolibro, interlingvistikaj artikoloj. Membro de la Akademio de Esperanto. Kunredaktoro de *Monato*. En diversaj tempoj kunfondinto kaj kungvidinto de SEJM, ASE, SEU, REU, komitatano de TEJO, komitatano kaj ĉef-delegito de UEA; kunfondinto kaj membro de EVA. (El la libro recenzata: "Komentaro" post la teksto pri *Sonfiguroj* verkita de Kolker, pp. 139, 140).

\* Prononc-helpoj (plejparte prenitaj el la recenzata libro; 'á, é, ó' en la transskribo-formoj estas 'a, e, o' akcentataj): Auld – old, Broadribb – bródrīb, Joel Brozóvski – ĝoel brozóvski, Gianfranco Cazzaro – ĝanfránko kacáro, Kováts – kóvaĉ, Lejzerowicz – lejzeróviĉ, Baghy – bági aŭ bógi, Wells – ŭelz, Leslie – lézli, Schwartz – ŝvarc, Baur – baŭr, Beaucaire – bokér, Nádasdi – ná:dasdi. Boriso Kolker prezentas ankaŭ la personajn nomojn kaj li komencas la prononcindikojn majuskle (ekz. Bokér). Liaj multnombraj person-prezentoj kun prononcindikoj certe helpas eĉ pli-malpli spertajn esperantistojn.

Ĉi tiu vidinda, havinda kaj uzinda libro estas modifita (reviziita kaj renovigita, Roterdama) eldono de samtitola libro aperinta en 1992 ĉe Progreso, en Moskvo. Kvazaŭ-kurso kaj kvazaŭ-klubumo, ĝi konsistas el 26 lecionoj, imageblaj ankaŭ kiel 26 klubaj kunvenoj. Krom la esenca enhavo, tion atestas ankaŭ program-anoncetoj tra la libro (ekz. pp. 17, 18, 23, 26, 29, 89...259): jen tio kaj tio estas la programo de nia sekva kunveno, jen tiu kaj tiu gastos ĉe ni, jen pri kio la gasto estas parolonta. "Nia klubano Leonido Klimov antaŭ nelonge venis el Parizo, pri kiu li montras al ni sian videofilmon. Sed antaŭ tio li deklamos fascinan versaĵon de Leonard Newell pri tiu fascina urbo" – oni povas legi la anoncon sur okra fono (p.17), kun referenco je posta komento pri Newell (30, p. 19), antaŭ la poemo *Parizo*, kies unua verso estas: *Postlasis mi la koron en Parizo*.

La celo de Boris Kolker estas kaj firmigi la lingvajn kapablojn por sukcese kaj altnivele (se necese, eĉ elokvente) uzadi Esperanton, kaj enkonduki legantojn en la esperantistajn vivon kaj kulturon, inkluzive la nunan staton kaj la ĝisnunan historion. El la intervjuo de Katalin Kováts estas konfirmite, ke la plej grava motivo de la aŭtoro tamen estis io tria (vidu ankaŭ supre): liveri gvidlinion por organizado de bonaj kluboj kaj kluba vivo. Nu, eĉ se troviĝos nur malmultaj kluboj kaj kursoj, kiuj la planon liveratan de li sukcesos (je tempo kaj diligento) plenumi, almenaŭ individue certe multaj esperantistoj frukt-uzos lian laboron. Inspiro nin liaj multesprimaj frazoj: *Esperanto estas tiel bona lingvo, ke ĝi meritas esti parolata sed ne balbutata. Esperanto-lando estas tiel ĉarma lando, ke ĝi meritas esti enloĝata de lingve altkleraj civitanoj sed ne de duon-analfabetoj ĉiam pretaj elmigri en Mal-Esperanto-landon. Regi Esperanton perfekte povas ĉiu, ankaŭ vi, kara leganto* (p. 11).

La libro konsistas el 26 lecionoj. Skemo de leciono laŭ mia percepto estas proksimume jena: a) klasika (bona, literatura, historia) teksto, b) alia literatura teksto, c) tria altkvalita teksto (ekzemple: poemo), d) komentario, f) lingva praktiko. La tekstojn do sekvas (po 9 – 44) komentoj kaj (po 13 – 23) taskoj. La komentoj komence estas eble averaĝe pli abundaj; poste oni povas jam uzi pli kaj pli el la materialo jam prezentita. La aŭtoro resendas, referencas; la kursano relegas aŭ rememoras komentojn ankaŭ pli fruajn. Multaj komentoj estas pretaj enciklopediaj artikoloj.

En la partoj nomataj *Lingva praktiko*, multaj taskoj ŝajnas kreitaj laŭ la komunikada principo: ili devigas onin esprimiĝi en certa tipo de situacio; parte ili estas komprenkontrolaj kaj lerninstigaj. Regule estas aktivigataj, krome, konoj kaj kapabloj pri uzo de sufiksoj, parolturnoj, proverboj. *Lingva praktiko* kutime enhavas instrukciojn kaj demandojn similajn al ĉi tiuj – prenitaj el la dua kaj el la dek-oka lecionoj: 2/1: *Klare montru la temon de la teksto per unu frazo*. 2/4: *Kiujn eventojn en la historio de Usono vi konsideras precipe interesaj aŭ gravaj?* 2/12: *Prezentu, kiel vi kondukus, se vi estus doganisto a) indiferenta pri siaj devoj; b) tro fervore plenumanta siajn devojn*. 2/23: (ene de "Kvizo") a) *Kiam la esperantistoj povas paroli pri la utileco de Esperanto precipe konvinke kaj kial?* – 18/1: *Listigu la metodojn de la aplikata geofiziko kaj klarigu, por kio ili estas uzataj*. 2/13: *Zorge komparu la tradukojn (de Eŭgeno Onegin)... trovu trafajn kaj maltrafajn lokojn,...* 2/14: *Klarigu, kion signifas la sekvaj vortoj: Lumilo, paŭlo, fusilo, balailo (...)* La taskoj kompreneble rilatas al fragmentoj en la antaŭaj tekstoj: La nombro de la taskoj estas pli ol kvarcent.

La libro laŭ Esperanto-landa komparo havas aspekton tre belan: brila papero, tut-titolpaĝa foto kaj dorspaĝa aŭtoro-foto, ĉie fotoj kaj desegnoj interne. La aranĝo de la teksto estas ekonomia. Laŭ la fotoj de personoj kaj laŭ ĉ. 30 librofotoj oni povas eĉ vidimagi diversajn epokojn de la historio de Esperanto, kun diversaj emociaj nuancoj kaj etosoj. Se iam oni havos la necesajn (financajn, teknikajn) rimedojn, ĉe sekva eldono, tamen valorus iom pligrandigi kaj la paĝojn, kaj la literojn. Por ion tre bonan igi perfekte-proksima, eblus aldoni indekson de la nomoj kaj temoj – la tre riĉa enhavo ankaŭ tion penindigus. Laŭ aŭtora koresponda komento mi aldonas: pro supozataj sekvoj koncerne pezon kaj prezon, oni malkonsilas kaj malverŝajnegas tiajn modifojn.

La du celoj de Kolker estas lingvoinstruado kaj enkonduko en la esperantistajn vivon kaj kulturon. Mi nun atentigas pri la graveco de la celo d u a – kaj pri ĝia lerta efektivigo. Kolker, unue, serĉis kaj trovis, parte ja mem verkis (pp. 54, 133, 193, 268) simpatiajn tekstojn, inter ili "kvazaŭ-konversaciojn", imagatajn intervjuojn. Poste – kaj pli grave – li sukcesis tiujn agrablajn tekstojn aranĝi en sinsekvo, kiu per si mem prezentas ankaŭ skizon de la historio de Esperanto. Li trovis rakontojn,

kiuj prezentas la samajn temojn kaj subtemojn jen serioze, precizeme, solene, jen sprite kaj humure: tiuj du flankoj kune bone fiksiĝos, mi pensas, en ies ajn memoro. Oni legas de Ludoviko Zamenhof mem pri la temoj *Kiel naskiĝis Esperanto* (p. 13), kaj kiel li vivis, laboris, kreadis (*Pri mia vivo*, 84); oni trovas seriozajn resumojn pri la historio de la movado kaj de la literaturo dank' al William Auld, Sergej Kuznecov, Ulrich Lins kaj Boris Kolker, sed oni trovas ankaŭ la gaje-gajigan interpreton kaj prezenton de esperantistaj troigoj fare de Izrael Lejzerowicz (*El la Verda biblio*, 15). Atenta leganto trovos prezentitaj tempe kaj loke diferencajn nuancojn de esperantistaj vivopraktiko, agad-idealaj kaj vivmanieroj pasint-jarmilaj, pasint-jarcentaj, pasint-jardekaj, tra lingvoterenoj kaj landoj bulgara, franca, ĝermana, ukraina, rusa kaj ceteraj.

Se paroli pri lingvaj kaj stilaj nuancetoj: min ĝojigis la (re)aktiva uzado de strukturoj kun *estas -ita*: “La libro estas verkita kvazaŭ taglibro de ideala Esperanto-klubo”,... “En la lernolibro estas uzitaj diversaj tipoj de ekzercoj”, diras la aŭtoro, en la epoko, kiam iuj konas preskaŭ nur la formon *estis...-ita*. Malplaĉetis al mi eteta (diversaŭtoro) trouzo de la verbo *studi* – eble, mi pensis, modernaj homoj ne plu lernas ion ajn, ili nur studas senĉese), kaj –, malgraŭ subtenaj Zamenhofaj kaj Varenĝenaj uzmodeloj, mi ne ĝojis pri ripetigado de la kliŝo “konatiĝi kun io”. Jes, muzeo, pejzaĝo, ekspozicio, libro ja konatiĝas al vi, al mi, al iu ajn, sed mi, miaflanke, ne konatiĝas al la muzeo, nek iĝas mi konata kune kun ĝi. La aŭtoraj (Kolkeraj) frazoj, tekstoj estas tre klaraj. ...

Oni trovas tipe sobran esperantistan argumentadon pri la avantaĝoj de Esperanto laŭ John Leslie (*Ferioj*, 22); teorian, lingvistikan, pensulan, artistan pritrakton de la ĉiel bona, arte esprim-lerta, psike komforta Esperanto laŭ Claude Piron (fragmento el *La bona lingvo*, 144); sed ankaŭ ironian prezenton de la esperantista vivo fare de Cezaro Rosetti (*Sonĝo teruras, sonĝo forkuras*, 73), Julio Baghy (*Estas mi esperantisto*, 76) kaj Raymond Schwartz (*Esperantisto, ekesto kaj malapero*, 77). Preter divers-vidpunktaj kaj divers-detalaĵaj teoriaj prezentoj de la lingvo, kiel tiu de Bokarĵov (*Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof*, 154), aŭ tiuj de John Wells pri bona prononcado distingo-ebliga (37) kaj la afiksaro derivu-ebliga (196), oni trovas ankaŭ la majstran *zozon* verkitan de la spritplene sprita Louis Beaucaire: temas pri la literaturaĵo *Zozo, la dek-sepa regulo de la Fundamento*. Boris Kolker tamen volas prezenti ne

nur Esperantujojn, sed ankaŭ la ceteran, ne-esperantistan, mondon.. Jen kial li enlibrigis tekstojn pri Hungario (de János Nádasdi, 66-67), pri Aŭstralio (de Donald Broadribb, 131-133), pri Usono (verkitan de Boris Kolker mem, kaj alian de Aleksandro Ŝalnev, 224), kaj pri Svislando (Arthur Baur, 160).

Mi scias de la aŭtoro, ke iu sentas mankon de trarigardo de la muzika kulturo en la libro. Mi scias laŭ la sama fonto, ke Boris Kolker mem volonte traktus pli detale la historion de la universalaj kongresoj, sed li simple ne plu havis spacon por tio. Eble tria persono volus legi ion koheran pri provoj de kino, de la sceneja, pupteatra artoj, pri reflektiĝo de ĝeneralaj filologiaj kaj filozofiaj problemoj, tendencoj en Esperanto. La eldonjaro de la unua versio de la libro estas 1992: en la jaro 2002 oni sentas, ke inter la literaturaĵoj meritis lokon fragmento el verko de Trevor Steele. Eble la sekva eldono ion tian... aldonos. Al mi manketas, ĉe tiom bona cetero, ĉapitro pri la Esperanta gazetaro. Mi tuj aldiru, ke tion parte kompensas fotoj, ekzemple de numero de malnova *Ondo de Esperanto* (45), numeroj de *Kontakto* (36), *Literatura Mondo* kaj *Fonto*



*Dum la prezento de la libro en Fortalezo (Kolker la 2-a de maldekstre)*

(118) kaj eĉ pli tekstoj-komentoj kaj foto-komentoj divers-lokaj, ekzemple la noto pri *Monato*, *Kontakto*, *Fonto*, *Scienco kaj Kulturo*, *Literatura Foiro*, *Juna Amiko*, *Internacia Pedagogia Revuo*, *Eventoj*, *Heroldo de Esperanto*, *Scienca Revuo* ktp post la pri-utiliga artikolo de Joachim Werdin (*Kaj post la kurso, kion?* 17, p. 70). Simile, tre bonvenas la noto pri *Literatura Mondo*, kun Kalocsay, Waringhien, PAG kaj aliaj verkoj (12, p.108), la noto pri la revuo *Esperanto* kun Edmond Privat (2, p.119), renova noto kun mencio pri *Oomoto*, *Language Problems & Language Planning*, kiel pri redaktaĵoj de *Joel Brozovsky* kaj *Humphrey Tonkin* (p. 254).

Kolker kunmetas, apudigas verkojn senteme kaj sentesprime. *Logiko kaj sento*: estas fragmento el la libroforma studo *Esprimo de sentoj en Esperanto* (1957) fare de Edmond Privat, verko kiu tre multe diras pri la kvazaŭ spontaneaj ebloj de Esperanta esprimado de impresoj, animstatoj, etosoj kaj emocioj. La ideojn de Privat sekvas fragmento el la plej bela sentesprima Esperanta prozaĵo: *Ombro sur interna pejzaĝo* (1984) de Spomenka Štimec.

Ĉiu el la 26 lecionoj Kolkeraj, kiel oni jam scias, enhavas ion beletran aŭ almenaŭ ion arte verkitan, ĉiu leciono enhavas komenton, kiu reference al numeroj en la ĉefaj tekstoj multon klarigas kaj nin, legantojn, klerigas, kaj ĉiu leciono, kiel dirite, enhavas parton nomatan lingva praktiko. La komentoj, tre laŭdindaj, iom post iom tuŝas ĉiujn interesajn punktojn de la gramatiko kaj tre multajn momentojn de la Esperantaj historio kaj kulturo. Pri la lingvaj praktikoj mi havas la impreson, ke jes, ili efike ekzercas nin diligentajn kaj bonvolajn legante-lernantojn pri tiu aŭ alia gramatika punkto, sed plie kaj prefere – ili instigas je atenta legado kaj relegado de la traktataj tekstoj. Klare, ili relative malmulte instruas en maniero, kiu konvenus por komencanto – sed tion oni ja ne celas nek promesas. Ili helpas sistemigi elektitajn detalojn kaj ili tre helpas profundigi la manieron legi: oni, instigate de la demandoj, komencas legi atente. Fine – se troviĝos konvenaj instruantoj – ili tre helpas ankaŭ kontroli efektivajn kursanojn kiuj volas ne nur studi, sed ankaŭ ellernadi aferojn...

Samtempe, la libro evidente nek celas, nek povus konigi k o m p l e t e la historion de Esperanto aŭ tutan ĝian literaturon. Aperinta en la jaro 2002, tre riĉa je indikoj pri la historio de la Esperanta kulturo, tamen ĝi ne estas

(certe eĉ ne povus esti) ĝisdata, nek temare ĉiom-ampleksa... Kiam oni devas elekti, oni elektas diverse. Vidante aliajn klasikaĵojn, valorajn aŭ gravajn tekstojn, al mi iom ekmankis trakto de, aŭ fragmento el, la Esperanta traduko *Kalevala* de Leppäkoski (1964), aŭ el *La inĝenia hidalgo* de Cervantes (traduko de Diego aperinta en 1977), *Grimm-duopa fabelo* tradukita de *Kabe*, ideoj pri rolo de A. *Grabowski*, perspektiva rigardo al la *Bulonja Deklaracio*. Fragmento el *Kalevala*, ekzemple, ne troveblas en la libro – kiel mi eksciis de la aŭtoro – pro decido entute rezigni pri karakterizo aŭ sistema prezento de la traduk-literaturo. Tamen ideoj pri ebloj bone traduki nepre aperas en ĉiu el ni, kiam ni legas kvin versiojn de la unua strofo de *Eŭgeno Onegin* (188-189).

Pli zorge ol E-instruantoj, kutime, Kolker atentis pri vive gravaj temoj kiel manĝado kaj kuirarto; tial li prenis kaj prezentas al ni konsilojn de Inna Litvina (*Kiel, kiam kaj kiom manĝi*, 217-218). Krome li evidente celis enlibrigi ankaŭ la plej gravajn elementojn de la niatempe nova Esperanta teĥnika leksiko. Por kontroli mian aserton legu lian tekston *Pri Interreto per simplaj vortoj* (168-172) aŭ artikolon de Gianfranco Cazzaro *Mikroskope vastaj horizontoj* (204-205), prenitan, kun mallongigo kaj referenco, el la revuo *Monato* (1997, n-ro 2, p. 12-12).

Verŝajne ĝuste pro bona prezento de periodoj en Ruslingvio (dank' al Boris Kolker, Leo Vulfoviĉ, Mikaelo Bronŝtejn, interalie pp. 13-15, 43-45, 112, 115), manketas al mi prezento de movad-organizaj ŝanceliĝoj kaj konfliktoj en la pli okcidenta parto de Esperanto-lando, kvankam ion tian ja sentigas teksto de Humphrey Tonkin (247-249), kiu prezentas stadion de nia evoluo kaj atentigas pri la taskoj de disvastigado. Mankas (al mi) trakto de aŭ fragmento el la nova klasikaĵo *Poemo de Utnoa* fare de Abel Montagut – ŝajne mankas ankaŭ mencio pri ĝi – aliflanke mi ne forgesu, ke la Ibera skolo estas prezentata (191). Almenaŭ ne okulfrapas konsidero de evoluantaj aŭ stagnantaj, ŝatataj aŭ neglektataj, ideoj de Saussure kaj Wüster pri “neceso kaj sufiĉo”, “elektebla precizeco”, manieroj influi la terminologian laboron – temoj nepre gravaj por Esperanto. Enhavas iom da troigo la prezento pri la laboro de BSO, forestas ĝia esenca karakterizo. Nu jes, tion oni eĉ ne postuletu de postkursita libro: jen, mi parolas jam evidente pri miaj subjektivaj legemoj kaj preferoj.

La libro, rekomendata por tiuj, kiuj emas profundigi siajn konojn, ne liveras sisteman gramatikon, kaj (kvankam multe helpas) ne neprigas kompletigon de la kursanaj konoj okaze de ĉiu eventuala manko de prepariteco pri gramatiko aŭ leksiko. La aŭtoro edukas je bona uzo de la lingvo Esperanto antaŭ ĉio per abunda prezentado de imitindaj, altkvalitaj tekstoj kaj per ilia bona, detala laŭenhava prilaboro, malpli per ia sistema prezento kaj prilaboro de la gramatiko. Multo, sed precipe la bona komentario, la tekstoj kiel tiu pri *Parolfiguroj* (de Kolker, laŭ Lapenna), pri *Sonfiguroj*, pri *IEM: La universala biblioteko de Esperanto* (fare de Herbert Mayer, p 172-174) ebligas, ke la libro estu uzata ankaŭ en universitata instruado. Nur iom post iom oni rimarkos, kiom da historiaj faktoj, datoj, nomoj, indikoj pri personoj aperas ĉi tie la unuan fojon, kiom da aferoj estas kompare al informoj pli fruaj, ĉi tie korektitaj, precizigitaj, ĝisdatigitaj. Elstaras cetere la multflanka prezento de la aŭtoro de Esperanto.

Tial mi rekomendas rekonsideri la sindifinon de la verko tute serioze. Jen verko por p e r f e k t i g o de la scio de tiuj, kiuj jam efektive havas la fundamenton, kaj do kiuj havas la eblon kun spirita komforto lasi sin influigi de la tekstoj elektitaj bone kaj komentitaj bonege..

Ĉar la libro enhavas sume pli ol 400 taskojn, plenuminte ilin, vi (iu ajn el ni) scios certe multe pli ol antaŭe. Eĉ pli da scioj kaj informoj liveras la admirinde riĉa aro-da-aroj da komentoj. Laŭ la pli ol 600 komentoj oni povas havi klarigojn (por liveri hazardecajn ekzemplojn) pri la *Akademio de Esperanto*, pri *Vilno*, pri *Eŭgeno Miĥalski*, pri la eldon-agado de *Juan Régulo Pérez*, pri *Éva Tófalvi* kaj *Oldřich Knichal*, pri la *delegita reto de UEA*, pri *SAT*, pri la *Originala verkaro* de Zamenhof, kaj pri *Pasporta Servo*. Eminente resumas Kolker ekzemple konojn pri la prijidaj studoj de Zamenhof, kun novaj aŭ apenaŭ konataj detaloj (p. 119). Li prezentas kaj ofte kompletigas (ĝisdatigas, korektas iam aliloke erarajn) biografiojn. Rekomendindas legi, ekzemple, liajn biografiajn notojn pri *W. Trompeter*, *G. Waringhien* (p. 221), *M. Bronštejn*, *B. L. Pasternak*, *I. Nemere*, *T. Sekelj* ktp., ankaŭ pro bibliografiaj indikoj enkomente.

La aŭtoro konsideras (11) sian laboron samtipa kun *Paŝoj al plena posedo* de Auld kaj *Faktoj kaj fantazioj* de Marjorie Boulton. Fakte, ĉe Auld eĉ la strukturo de la lecionoj (paŝoj) estas simila al tiu de la Kolker-aj lecionoj.

Auld havadas la partojn *Vortaro*, *Legajo*, *Ekzerco*. Simplajn, vaste konatajn vortojn (kiajn Auld ja ne tute evitas en siaj segmentoj *Vortaro*), Kolker ne difinas; oni ion sciu jam komence. Aliajn parenco-elementojn de la *Vortaro* de Auld oni serĉu ĉe Kolker principe en la komentarioj – tamen la celo ĉe Kolker estas pli ofte kleriga, ol nur lingvo-instrua. Tion, kion enhavas ĉe Auld la partoj *Legajo*, *Ekzercoj*, kovras la Kolkeraj *tekstoj* kaj *Lingva praktiko*. La kvanto kaj gamo – la ĉiu-leciona plureco – de valoraj tekstoj ĉe Kolker estas speciale atentinda. – Finfine kaj sume, la kolekto de Kolker estas ankaŭ pli freŝdata ol tiu de Auld, ankaŭ simple pro la paso de la tempo kaj pro la kvalita evoluo de Esperanto-apliko. Tekstoj estas ĉe Kolker regule – pluraj. Aldoniĝas prikulturaj informoj (krom la leksikaj) en la komentario.

Krom la menciitoj, iasence antaŭuloj de Kolker estas laŭ mi ankaŭ la sekvaj figuroj de la Esperanta kulturhistorio: Julio Baghy (pro la legemiga *Verda Koro*), Edmond Privat, pro la leginstiga Karlo (kaj ankaŭ pro la du popularaj Esperant-historiaj volumoj de Privat), Alberto Fernández pro *Senĝenaj dialogoj* (1971), Klaŭdjo Piron, pro *Gerda malaperis*, Hektor Alos kaj Kiril Velkov, pro *Ek al leg'*, kaj Stefan MacGill pro la legendaj *Laŭta vekhorloĝo*, *Pordoj*, *Tridek roluloj* ks. Simile postuleman al la uzantoj, literatur-citan, samtempe pli lernolibrecan instru-verkon produktis kaj aperigis ĉe Hungaria Esperanto-Asocio Ottó Haszpra (2001). Escepte la lernolibron de Haszpra, ĉiu el la menciitaj verkoj, kaj nun ankaŭ tiu de Boris Kolker, celas progresigi nur tiujn, kiuj ja kapablas jam l e g i en Esperanto. Havas similan celon sed konsistas nur el tekstoj *Baza legolibro* de Johano Sárközi. – Havas ja celon alian, sed rilatas simile lingvoŝate, formoĝue al la tekstoj kaj al la librouzantoj la aŭtoro de *Step by step in Esperanto* de Montagu C. Butler (1965). – Por Boris Kolker, kiel li mem sentigas iel en siaj personaj eldiroj, verki lernolibron estas ankaŭ maniero de sinesprimo. Tiuj, kiuj jam uzis – kaj nun, kortuŝitaj, ĝoje kaj entuziasme laŭdas – liajn lernolibrojn kaj instrumaterialojn, supozeble sentas kaj alte taksas ankaŭ tiun subjektivan fonon.

Por fini: mi elkore gratulas al Boris Kolker: lia evidenta ŝato al vere bonaj Esperantaj tekstoj, liaj mondokono, historio-kono, inventemo kaj persista redakta laboro produktis tre bonan, utilan libron. Evidente, mi – kaj aliaj simile – bezonas ankoraŭ tempon por ekkoni la libron vere bone, por povi ĝin analizi laŭmerite kaj por uzadi ĝin plensukcese.

Mi dankas al Boris Kolker pro la diligenta kaj tre helpa koresponda korektado kaj aldonaj informoj, same al la redaktantoj (Katalin Kováts, Jozefo Németh) pro instigoj, helpado, korektado, redaktado, pacienco, nun kaj alifoje. Dezirante sanon kaj simile sukcesan pluan laboron, mi la recenzon – finas.

*Blazio Vaha*

## ***el la landoj kaj sekcioj...***

### **Aŭstralio**

#### **Ĉu belega varma sunbrilo ne allogas vin ĉiam?**

Kial ne forlasi la nordhemisferan vintron por pasigi neforgeseblan tempon en Aŭstralio ĉe la 19-a Aŭstralia Somerkursaro de Esperanto? Ĝi okazos inter la 5-a kaj la 17-a de januaro 2003 en la mirinda urbo Melburno (ĉe la Internacia Domo, internacia kolegio de la Universitato Melburno).

Krom ĉiutaga instruprograme en diversaj niveloj fare de plej kompetentaj profesiaj instruistoj, Penny VOS, Franciska TOUBALE, Grazina OPULSKIENE, Marcel LEEREVELD kaj Atilio ORELLANA ROJAS, estos ofertataj en la posttagmezo tre diversaj okupiĝoj, kiel ekzemple kantado, kreema verkado, ludoj, informatiko, preparado por ekzamenoj kaj eĉ tempo por privata studado. Vespere vi povos ĝui interesajn prelegojn, dancadon kaj vizitojn al lokaj drinkejoj kaj dum la semajnfino ege interesan viziton al Ballarat, la bela 'orurbo' de Viktorio aŭ al Sovereign Hill, la antikva urbo de orminejoj.

La kotizo estas proksimume EUR 100.00, loĝloko po EUR 25.00 nokte (kaj tio inkluzivas 3 bonajn manĝojn), kaj plej grave: la studentoj malpli ol 30-jaraj ricevos la valoron de la kotizo, se ili sufiĉe bone plenumos la postulojn de la kurso!

Pliaj informoj kaj aliĝoj pere de: *Jennifer BISHOP, Faculty of Education, PO Box 6, Monash University, AU-Victoria 3800, Aŭstralio, Tel +61 3 9818 7358 kaj +61 3 9905 2806, fakso +61 3 9905 3668, rete: esperanto@Education.monash.edu.au.*

### **Aŭstrio**

#### **Longa Nokto en Vieno**

En Eŭropo estas jam bela tradicio, ke dum unu nokto la muzeoj invitas al specialaj programoj: En la nokto de la 5-a ĝis la 6-a de oktobro tio okazis en Aŭstrio, kun plej granda sukceso. Ĉi-jare partoprenis ankaŭ Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. La speciala programo estis rektmetodaj kursetoj, prezentitaj je ĉiu plena horo. Majstre gvidis tiujn praktikajn prezentojn de Esperanto gasto el Nederlando, s-rino Katalin Kováts, kiu sukcesis peri la bazajn nociojn de Esperanto al proksimume 200 personoj el entute 11 landoj. La aplikata metodo vere estas ideala: Dum la kurso s-rino Kováts utiligas nur Esperanton kreante memevidentajn komunikajn situaciojn, tial ĝi taŭgas por ĉiuj – sendepende de aĝo aŭ de gepatra lingvo. La reago de la publiko estis entuziasma. Kelkaj infanoj ne volis ĉesi kaj daŭrigis la ekzercadon eĉ en la paŭzoj por lerni Esperanton en tiel plaĉa maniero.

*HR Mag. Herbert Mayer  
Internacia Esperanto-Muzeo*

### **Finnlando**

#### **Ĉu idealaj lecionoj?**

La studentoj komforte sidas en foteloj, la instruisto inter ili, en la sama amika rondo. Li estas ĉarme vestita, la kolorojn de siaj vestaĵoj li saĝe elektis. Aŭdeblas trankviliga klasika muziko. En bela florzono odoras freŝaj floroj. La studentoj silente legas novan tekston aŭ aŭskultas la plaĉan laŭtleĝadon de la instruisto (aŭ eble bendon). Sur la muroj videblas koloraj bildoj, kopiitaj el la interreto, kaj Esperantaj vortoj. Ekspoziciitaj estas ankaŭ Esperantaj salutoj, opinioj kaj grupverkaĵetoj de la lernantoj.

La plej gravaj eroj en la instruado estas la personeco kaj la pozitiva sinteno de la instruisto, kvankam li neniel reliefigas sian rolon. En la kursejo ne troviĝas podio, instruista katedro aŭ pupitroj. La instruisto laboras kiel kamarado, helpanto, kuraĝiganto. Neniam li eldiras riproĉan vorton. Li nur ridetas, laŭdetas, laŭdas kaj laŭdegas. Ĉio estas bonega. Se iu el la studentoj ŝajnas deprimita, malkuraĝa aŭ pensanta pri aliaj aferoj, la instruisto afable revenigas tiun al koncentriĝo kaj memfido. La instruisto faras sian eblon por esti justa kaj helpema al ĉiuj; li nek havas

favoratojn nek troe atentas iun el la grupanoj. Li ne altrudas siajn prelegojn sed prefere paroligas kaj ludigas la lernantojn. Neniam li aludas, ke lingvolernado povus esti peza kaj malfacila tasko, kiu postulas persistemon kaj diligenton. Neniam li komencas la instruadon per la antaŭaverto, ke nun oni aliros nefacilan gramatikan punkton, kiun ĉiu nepre atentu kaj post kiu okazos ekzameno ktp. Nur li mem scias, kiom li devis studi kaj legi kaj ekzerci sin por atingi la ŝajnan facilon, kiu karakterizas la lecionojn.

Jen kaj jen la studentoj ridetas aŭ ridas, kaj la instruisto ridas kun ili. La studentoj ne nur pagis altan sumon por la kurso sed ankaŭ rezignis pri siaj ferioj aŭ libertempo; nun ili ne laciĝu aŭ tediĝu. Ĉiujn enuigajn lecionojn oni ja forgesos. Krome, tediĝo povus malagrabligi la tutan studobjekton kaj forpeli la lernemulojn por ĉiam. La studentoj devas senti, ke ili lernas senpene, kvazaŭ ludante kaj amuzante sin. Ili ĝuas per ĉiuj siaj sensoj. Manĝaĵojn ili gustumas kaj lernas vortojn pri la gustoj kaj kulturoj. Sensoifigante sin ili lernas, kiel paroli pri trinkaĵoj kaj trinkado. Ili movas siajn membrojn kaj gimnastikas, ili flaras odorojn, ili fariĝas atentemaj pri koloroj kaj formoj, ili kantas kaj dancas. Per siaj manoj ili palpas la formojn kaj surfacojn, ili tuŝas ankaŭ unu la aliajn, se la kutimoj de la kursejo/lando tion permesas. Per la lango ili parolas Esperante. Eĉ post la leciono ili interparolas pri la okazintaĵoj kaj lernitaĵoj kun granda plezuro. La studentoj havas kaŝnomon kaj rolon, kio igas ilin forgesi siajn ĉiutagajn rutinaĵojn kaj interrilatojn. En la kaŝnomoj povas kaŝiĝi ankaŭ praktiko pri sonoj, kiuj estas problemaj ĝuste en tiu grupo (ekzemple en Finnlando ŝ, ĉ, c, ĵ, ĝ, z). La kaŝnomoj ŝajnigas, ke la grupanoj estas el malsamaj mondopartoj. Tiel ili kreas refreŝigan iluzion pri multkultureco. Tio igas la partnerojn pli interesaj, alparolindaj kaj pridemandindaj, ol kiam ili estas siaj veraj memoj, eble jam de longe konataj unu de la alia kiel samklubanoj aŭ samlandanoj. Pri siaj roloj kaj la lingva teatrumado dum la kurso ili kunplezure rememoros eĉ monatojn aŭ jarojn post la kurso.

Tia instruado multon postulas de la instruisto. Antaŭ la kurso li konatiĝas kun la kulturo kaj kutimoj de la instruotoj. Li zorgeme pretigas sian lernoplanon, kiu tamen ne estu tute rigida. Li devas adaptiĝi laŭ la realaj grupo kaj situacioj, kaj tial li tre atentis la reagojn kaj sentojn de la studentoj dum la lecionoj. Malgraŭ sia ĝisfunda prepariĝo kaj planado, la

instruisto dum la kurso kreas etoson de libero, spontaneco, unikeco kaj kreivo. Li scias, ke al la celo, kiun li deziras atingi, estas multaj vojoj, kaj li pretas plenumi la bezonojn de la grupanoj kaj gvidi ilin tiel, ke la celoj kaj metodoj ne koliziu. Ĝuste tial tre gravas, ke li antaŭsciu plej eble multon pri la instruotoj kaj la kursejo kaj ke liaj profesia kapablo kaj eruditeco sufiĉu por variado kaj adaptiĝo.

Tian bildon pri lingvoinstruado donis Atilio Orellana Rojas dum dutaga porinstruista seminario (Valamo, Finnlando, julio 2002). Se vi nun dubas, ĉu vi en viaj grupoj povas tiel instruadi, ne deprimiĝu! Ne ekzistas unu sola ideala metodo. Kiel jam dirite, la personeco de la instruisto ĉiam estas la plej grava. Se mankas al li modernaj instruiloj kaj komfortaj foteloj, tio ne igas lin senpova. Tion jam A. Cseh pruvis. Plej gravas la rilatoj inter li kaj la studentoj, la tiel nomata bona etoso, kiun oni povas atingi per sperto, amikeco kaj sindonemo. Inluas ankaŭ la tradicioj de la hejmlando(j) de la instruotoj. De aŭtoriteca instruado oni ne povas subite salti en modernan kunlaboron uzante ekzemple sugestopedian metodon. Entuziasmon, memfidon kaj ĝojon pri la lernado ni tamen provu ĉiel ŝirmi kaj tediĝon kaj senfruktan laciĝon eviti. Ni kuraĝigu demandemon kaj iniciatemon. Ni neniam kaŝu nin malantaŭ diplomoj imagante, ke ni jam perfektigis, ĉar vere bona instruisto ne ĉesas plilerni kaj eksperimenti.

*Raita Pyhälä, Finnlando*



*Sceno dum la instruista seminario en Valamo*



## Nederlando

### El la Sekretaria Raporto 2001<sup>4</sup>

La membraro komence de la jaro nombris 40 personojn. Forpasis J. DOUMA. Eksiĝis F. HELDERMAN, J. KUSTER, D.A. RIETDIJK, P. UITTENBOGAARD kaj F. van ZOEST. Fine de la jaro la membro-nombro estis 34. La Estraro kunvenis 3 fojojn. La Jarkunveno okazis en marto, en la sidejo de Internacia Esperanto-Instituto (IEI), en Hago. En tiu kunveno estis elektita Atilio ORELLANA ROJAS por la posteno de sekretario. Rob MOERBEEK (prezidanto) kaj Hans ten HAGEN (kasisto) pretis daŭrigi siajn funkciojn por unu plia jaro. „NGGE Sciigas” aperis 3-foje. NGGE decidis pri starigo de kunlaboraj rilatoj kun la Kuba ILEI-Sekcio. Komence NGGE subvenciis la ĉeeston de la Kuba Sekciestro en la ILEI-Konferenco en Lovran kaj sekvis sende de helpmaterialo por la ebligado de la instruado en diversaj kluboj.

La Studotago okazis en oktobro ĉe IEI. Tiam Nel OVERWATER prezentis la instrufilmon „Esperanto, pasporto al la tuta mondo”. Poste okazis diskutado pri lingvouzo sub la gvido de Rob MOERBEEK. La studotagon ĉeestis 10 personoj.

La ILEI-Konferencon en Lovran ĉeestis kiel komitatanoj por Nederlando Rob MOERBEEK, Nel OVERWATER kaj Atilio ORELLANA ROJAS.

*Laŭ la raporto de Atilio ORELLANA ROJAS*

### Studotago 2002

La 26-an de oktobro okazis ĉe Internacia Esperanto-Instituto la jam plurjara kaj tradicia Studotago organizita de la nederlanda ILEI-Sekcio.

Dum ĝi estas prezentataj temoj, kiuj eniras la sferon de intereso de la instruistoj. En tiu okazo Katalin KOVÁTS prezentis *edukado.net* konigante al la ĉeestantaro la strukturon kaj diversajn erojn de tiu hejmpaĝo. En la posttagmezo Robert von dem BORNE, prezidanto de la Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ), informis pri la varbistemo de NEJ por altiri interesitojn al la lernado de Esperanto aparte en la junulara medio kaj pri la instrumentoj uzitaj. La tago finiĝis per la kutima "Gramatika duonhoro", dum kiu la NGGE-Prezidanto, Rob MOERBEEK, donis atenton al la nova eldono de PIV kaj la ŝanĝoj en ĝi konstatitaj.

*Atilio ORELLANA ROJAS*

<sup>4</sup> Pro kaŭzo ne-redakcia, tiu ĉi raporto ne povis aperi ĝustatempe.

## Pollando

### Interlingvistiko populariĝas

La Interlingvistikaj Studoj de UAM (Universitato Adam Mickiewicz en Poznan, Pollando) atingis gravan momenton fine de septembro, nome la unuaj gestudentoj finis siajn studojn kaj sukcese defendis sian diplomlaboraĵon: Lenĉe Efremova el Makedonio prezentis la rolon de rido en la poemoj de Baghy, Andreas Emmerich, prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, analizis la E-lingvan tradukon de "La Mastro de 1' Ringoj" de Tolkien, kaj Peter Zilvar, same el Germanio, komparis la vortprovizon de kelkaj bazaj vortaroj Esperantaj kaj etnolingvaj kaj el ili kunmetis vortliston por la proponata Eŭropa lingvoatestilo.

Dum la sama semajno (23-27.09) 23 novaj gestudentoj komencis siajn studojn. La Interlingvistikaj studoj allogis interesitojn ne nur el Pollando kaj la ĉirkaŭantaj landoj (Germanio, Litovio, Rusio), sed ankaŭ el Aŭstrio, Belgio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Kroatio, Svedio kaj eĉ el Irano. Ses el ili povis partopreni danke al la stipendioj de ESF (Esperantic Studies Foundation) kaj unu danke al la stipendio ofertita fare de s-ino Mila van der Horst-Kolińska.



La internacia studentaro ĝuis la prelegojn de internacia profesorado. Kun prof. John Wells (Britio) ili malkovris la sekretojn de sonoj. Prof. Geraldo Mattos (Brazilo, prezidanto de la Akademio de E-o) prezentis al ili [vd. la *foton*] originalan aliron al literaturo surbaze de la unua periodo, kun la kontribuo de la poetino Lidia Ligeza kaj de Tomasz Chmielik. D-ro Zbigniew Galor (el la surloka stabo) enkondukis la aŭskultantojn en la multkoloran e-kulturon kun la kontribuo de s-ino Zofia Banet-Fornalowa pri E-teatro kaj de Judit Schiller pri E-filmarto. La partoprenantoj ekkonis kaj mem komparis la diversajn formojn de lingva kaj nelingva

komunikadoj en interkultura kunteksto laŭ la instigo de d-ino Ilona Koutny, gvidanto de la Studoj.

La interkomunikado daŭris vespere kaj semajnfine, kiam okazis la tradicia kultura renkontiĝo *Arkones* en Poznań. La kulturajn konojn kompletigis interalie la impresiga spektaklo de Jerzy Fornal (Aniaro) okaze de la 20-jara jubileo de lia unupersona e-teatro kaj muzika koncerto de Leszek Dobrowolski, Oĉjo Dadaev, Zuzanna Kornicka kaj de Mikaelo Bronŝtejn kun mielvino. Multaj aliaj prelegoj (pri Varankin, Dostojevskij, Eŭropa identeco, alfabetoj de Eŭropo, tradukarto, e-vortaroj en la reto, ktp.) kaj diskutoj amuzis la homojn. La kunordigo de la du aranĝoj pruviĝis ankaŭ ĉi-foje fruktodona.

*Dr Ilona Koutny, membro de AdE,  
gvidanto de Interlingvistikaj Studoj, Lingvistika Instituto,  
Adam Mickiewicz Universitato, Miedzochodzka 5, PL-60-371 Poznań*

**pri aranĝoj ...**

## 36-a ILEI-Konferenco

2003.08.02 – 07, Örestrand, Svedio

### a) Örestrand – la konferencejo

Örestrand situas en la plej suda parto de Svedio ĉe Sundo, la markolo inter Danio kaj Svedio. La konferencejo estas lokata tuj norde de la urbeto Höganäs, 20 km-ojn norde de Helsingborg. La ĉirkaŭaĵo estas plejparte kampara kaj bela.

Höganäs estas industria urbo, kie oni iam havis karbminejojn, sed hodiaŭ la karbproduktado ne plu funkcias. La urbo nun havas ceramikajn fabrikojn kaj ĝi estas mondfama pro siaj specialaj ceramikaj produktoj. Ankaŭ multaj lertaj ceramikaj artistoj kaj pentristoj troviĝas en la regiono.

De Örestrand oni facile povas atingi Kopenhagon, la danan ĉefurbon, kun ĝia granda internacia flughaveno aŭ Helsingborgon, de kie oni per fervojo povas vojaĝi ĉien en Eŭropo.

La konferencejo mem konsistas el diversaj domoj, kunvenejo, manĝejo kaj loĝdomoj. La komforto de la ĉambroj estas varia. Kelkaj ĉambroj havas propran banĉambron, aliaj havas komunajn duŝejon kaj necesejon en la koridoro. Estas unulitaj, dulitaj kaj plurlitaj ĉambroj. Eblas ankaŭ tendumi aŭ uzi propran ruldomon. Oni havos bonan parkejon.

La konferencejo havas propran banstrandon kaj grandajn gazonojn kie oni povas pilkludi, gimnastiki aŭ nur ripozi en la suno ktp.

### b) Mendilo de la 36-a ILEI-Konferenco

(2003.08.02-07, Örestrand, Svedio)

(Bonvolu skribi pres-literet!)

Familia nomo \_\_\_\_\_

Persona nomo \_\_\_\_\_

Naskiĝdato: \_\_\_\_ / \_\_\_\_ / \_\_\_\_ (jaro/monato/tago) Sekso: viro/- ino

Profesio: \_\_\_\_\_ Hobio: \_\_\_\_\_

Adreso: \_\_\_\_\_

Poŝtkodo \_\_\_\_\_ Urbo \_\_\_\_\_

Lando \_\_\_\_\_ Tel: \_\_\_\_\_

Fakso: \_\_\_\_\_ Reto: \_\_\_\_\_

Mi pagas konferenc-kotizon al \_\_\_\_\_ sume \_\_\_\_\_ EUR.

Mi komprenas kaj akceptas la kondiĉojn presitajn en tiu ĉi mendilo.

Subskribo: \_\_\_\_\_ Dato: \_\_\_\_ / \_\_\_\_ / \_\_\_\_

Aliĝkotizo \_\_\_\_\_ EUR

Donacoj al ILEI \_\_\_\_\_ EUR

Infankongresa kaso \_\_\_\_\_ EUR Loĝado \_\_\_\_\_ EUR

Eldona kaso \_\_\_\_\_ EUR Manĝoj \_\_\_\_\_ EUR

Dazzini kaso \_\_\_\_\_ EUR Ekskurso \_\_\_\_\_ EUR

Koleghelpa kaso \_\_\_\_\_ EUR Transporto \_\_\_\_\_ EUR

Interkulturo \_\_\_\_\_ EUR

Bankkosto \_\_\_\_\_ EUR

Sumo \_\_\_\_\_ EUR

✂ \_\_\_\_\_ *Tranĉu ĉi tie* \_\_\_\_\_ ✂

\* Pagmanieroj: al Poŝtĝirkonto 682117-7, ILEI c/o Boomee Kim-Lindblom, kasisto, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio

\* Bonvolu aldoni EUR 8 por bankkosto aŭ al ILEI-konto 'ilek-a' ĉe UEA (sen bank-kosto).

\* Bonvolu nepre sendi la subskribitan mendilon kun pago al la kasisto de ILEI.

### c) Aliĝkotizoj por la 36-a ILEI-konferenco

2003.08.02-08.07 – Örestrand, Svedio

A- kaj B-landoj same kiel ĉe UEA. La prezoj estas indikitaj en EUR.  
La kotizo ne inkluzivas loĝadon, manĝon kaj ekskurson.

Periodoj	ĝis 03-1-31	ĝis 03-4-30	ekde 03-5-1
<i>Kategorioj</i>	<i>A/B</i>	<i>A/B</i>	<i>A/B</i>
1. Membro	30/20	40/30	50/35
2. Ne-anoj	40/25	50/35	55/40
3. Junulo/handikapulo	20/15	30/25	40/35

#### A. Loĝado (1 persono kaj 1 nokto)

- 1) Aneksaĵo-a (kun necesejo) 2-litaj: 42 EUR (kategorio - a)
  - 2) Aneksaĵo-b (necesejo koridore) 2-litaj: 35 EUR (b)
  - 3) Dometoj (sen necesejo) 4 litaj: 29 EUR (c)
  - 4) Pavilono (sen necesejo) 4 litaj: 23 EUR (ĉ)
- \* Mi mendas loĝadon en kategorio ... ekde la ...-a ĝis la ...-a de aŭgusto.  
\* Mi deziras loĝi kune kun ..... (nomo kaj lando).

#### B. Manĝoj

- 1) Kiel pakaĵo dum la tuta Konferenco, 3 manĝoj tage: 121 EUR (d)  
\* Krom ekskursita tago.
  - 2) Se oni mendas manĝojn aparte:
    - unu matenmanĝo: 5 EUR
    - unu lunĉo: 9 EUR
    - unu vespermanĝo: 14 EUR
- \* Mi estas vegetarano: jes ( ), ne ( )

#### C. Ekskurso ĉirkaŭ Sundo.....40 EUR (e)

Ne komuna buso, sed la plej moderna trajno kun komforto. Personoj, kiuj havas problemon promeni kaj moviĝi tutan tagon, bv. ne partopreni ĉi tiun ekskurson. Lunĉon oni mem aranĝas.

#### Ĉ. Transporto (de Gotenburgo al KF-ejo) nur tien (f)

\* Ankoraŭ ne decidita, kaj dependas de la aliĝ-nombro. Informo aperos poste.

### 35a Internacia Infana Kongreseto

Lerum, Svedio, 26 julio – 2 aŭgusto 2003

Du jarojn post la grandega Infana Kongreseto en Zagrebo, okazos denove IIK. Ĝi okazos en apudlaga feria centro Knappekulla, en la komunumo Lerum, 18 kilometrojn oriente de Gotenburgo. Loĝigo okazos en seso da lignaj dometoj, en ĉambroj kun inter 1 kaj 8 litoj. Aparta domo provizas manĝsalonon kaj kunvenejon. Ĉiuj domoj estas apudaj, kaj situas nur cent metrojn for de la lago Lilla Stamsjön (eta balbut-lago), kie eblas naĝi. La lago havas sablan fundon kaj puregan akvon. Apude estas arbaro, kie eblas trovi kaj pluki bongustajn mirtelojn kaj diversajn fungojn (kantarelojn). Estas ekstere tabloj, benkoj, kradrostejo kaj sporta tereno. Ĝi estas trankvila loko, sed ne tute izolita. La loĝigo estos konvena sed modesta. Infanoj devos kunporti proprajn lit-tukojn kaj ban-tukojn. Ekskursplanoj estas en preparo.

Inter eblaj programeroj estas manlaboroj, muzikado, kukbakado, paperfaldado, kvizoj kaj skeĉumado, dum ekstere estos sportoj, promenoj kaj akvo-ludoj. Estos konvenaj gvidantoj (ni celas unu por ĉiu kvino da infanoj, almenaŭ unu svedan lokulon). En la kuirado eblas atenti la dietajn bezonojn/dezirojn de infanoj. Jen la kotizoj en eŭroj: A- kaj B-landoj laŭ la UK-difino:

Limoj	A-landoj	B-landoj
31-jan 2003	195	165
31 mar 2003	225	195
31 majo 2003	245	215
poste	275	245

La kotizo kovras kostojn de transporto, restado, tri manĝoj tage kaj programo de la vespero de la 26a de julio ĝis la mateno de la 2a de aŭgusto. Ĝi inkluzivas nenium asekuron, kiun la gepatroj mem devas prizorgi, liverante pruvilon pri tio. Aliĝo ekestas definitiva kaj estos konfirmita post ricevo de minimuma antaŭpago de 149 eŭroj al la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio (UEA), kies alven-dato determinas la plenan sumon pagendan. La cetero estos pagenda plejlaste al la kasisto de UEA komence de la Universala Kongreso.

Ni akceptas nur infanojn kiuj jam komprenas kaj parolas Esperanton. Tiuj povas veni el E-familioj aŭ lernejoj klasoj. Infanoj, helpantoj kaj gvidantoj ricevas aŭtomatan kaj senpagan aliĝon al la UK. Infanoj post la unua en familio, kaj akceptitaj helpantoj, ricevos rabaton de 15%. Estas je dispono nur kvardek lokoj. Informilo kaj aliĝilo estos dissenditaj kun *Juna Amiko* 2002/4, kaj estas peteblaj de:

*Stefan MacGill (adreso – nova – sur p. 2.)*

## Metodika seminario en Ĉaĉak, 2003.06.22-29

La Balkana Komisiono de UEA kaj Esperanto-Instituto Beograd, kunlabore kun UEA kaj ILEI, organizas Someran Esperanto-Lernejon Ĉaĉak-2003 en Jugoslavio, en la tradicia okazejo de internaciaj E-aranĝoj. La programo konsistos el:

- Metodika seminario por instruistoj, instruantoj kaj instruontoj de Esperanto;
- Komenca kaj daŭriga kursoj de Esperanto;
- Kultura programo.

En la metodika seminario, kun teoriaj prelegoj, laborgrupoj, diskutrondoj kaj praktikaj instru-taskoj, estos traktataj la temoj:

- Celoj kaj planado de E-instruado. Motivigo de la lernantoj;
- Instruprocezo kaj instrumentoj;
- Strukturo de la leciono, maldedigo, lingvaj ekzercoj;
- Interkultura edukado per Esperanto kun ekzemplaj projektoj;
- Perkomputila E-lernado (edukado.net, Lernu! k.c.).

La partoprenantoj faros provlecionojn en la komenca kaj daŭriga kursoj kiuj okazos paralele kun la metodika seminario.

La kultura programo havos la tradiciajn programerojn de E-aranĝoj: Interkona vespero, internacia vespero kun Balkana vespermanĝo, lingvaj ludoj, interkultura kvizo, sportumado (urba naĝejo k.c.), ekskursita tago, adiaŭa vespero.

La kotizo, inkluzive sep tranoktojn kun tri manĝoj tage, varias inter 85 EUR kaj 220 EUR, kun ebla rabato sub certaj kondiĉoj.

Aliĝilo, detala programo kaj aliaj informoj riceveblas rete de Radojica Petrovic, <radp@ptt.yu> aŭ paperpoŝte de Dom uĉenika (por Esperanto-Lernejo), Uĉiteljska 8, YU-32000 Ĉaĉak, Serbio.

\*\*\*

### Redaktora noto

Pro teknikaj kaŭzoj (ne-redakciaj) en IPR 02/3 p. 14-15, la tri tabeloj aperis erare: meze, inter la du simboloj, anstataŭ streketo (kun signifo "kaj") ĉie aperis tria, erara simbolo: ■. Pardonu!

La nunan numeron de IPR – krom Katalin Kováts – provlegis Atilio Orellana Rojas, Bill Maxey, Mónica Molnár kaj Birke Dockhorn. Koran dankon al ili!

*Jozefo Németh, redaktoro*

### LABORKOMISIONOJ

**Ekzamena:** Duncan Charters (prezidanto), Bill Maxey (sekretario) ✉: [bmaxey@visi.net](mailto:bmaxey@visi.net)

**Elekta:** Gwenda Sutton (kunvokanto), Maritza Gutierrez, Joseph Catil

**Kontrolo:** Bertil Andreasson, Lars Forsman

**Lerneja:** Marija Belošević, Jennifer Bishop, Renato Corsetti, Stefan MacGill, Géza Kurucz, Maŭro La Torre, Raita Pyhälä

**Regulara:** Rob Moerbeek, Hans ten Hagen

**Terminara:** Maŭro La Torre

### KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

**FIPLV** (*Internacia Federacio por Instruistoj de Modernaj Lingvoj*)

Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop** ✉: [esperanto@Education.monash.edu.au](mailto:esperanto@Education.monash.edu.au)

**IEI:** *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

**UEA:** *Universala Esperanto-Asocio*, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Reprezentanto de ILEI: **Maŭro La Torre**; estrarano de UEA pri edukado: **Gbeglo Koffi**.

**UNESKO** (en operaciaj rilatoj). Reprezentantoj de ILEI: **Renée Triolle**, Bello Bauco, Chemin de la Civade Verte, FR-13600, La Ciotat, Francio; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Courmon d'Auvergne, Francio, tel. (+33) 4 73 84 90 60;

**Mireille Grosjean**, Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando, tel.+fakso (+41 32) 932 18 88, ✉: [mireille.grosjean@rpn.ch](mailto:mireille.grosjean@rpn.ch)

### MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

ILEI estas jure registrita ĉe la komerca ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

La membreco inkluzivas ricevon de 4 numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto: *Boo Mee Kim-Lindblom, Stenbockens gata 102, SE-136 62 Haninge; tel. (+46 8) 777 4175, ✉: boomee.kimlindblom@swipnet.se. Postĝirkonto: 682117-7, Stokholmo. S.W.I.F.T. - kodo: PGSISESS.* Membro-kotizoj: A-landoj (laŭ UEA-divido): 14 EUR, B-landoj: 8 EUR. Simpla abono sen membreco: 18 EUR. Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA: *UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64.* UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago. Kontoj ĉe UEA: ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko) kaj pike-b (Projekto Interkulturo). Detala listigo de pagmanieroj al UEA aperas sur p. 32. de Jarlibro 2002. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago.

**Reklamtarifoj por IPR:** 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

**Hejmpaĝo de ILEI ĉe:** <http://il.uniroma3.it/ilei>

### REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): R. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende. **Presado:** Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, Tel: +32-3-234 34 00. **Redaktejo:** NÉMETH József, HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5. Rete: [www.nl-papa.hu/ipr/](http://www.nl-papa.hu/ipr/); [jozefo@nl-papa.hu](mailto:jozefo@nl-papa.hu); [jozefo\\_nemeth@hotmail.com](mailto:jozefo_nemeth@hotmail.com), tel/fakso: +36-89/ 356-050. Vicredaktorino: [katalin@ikso.net](mailto:katalin@ikso.net). La revuo aperas ankaŭ kasete registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk. La nunan numeron ni sendis al la presejo la 5-an de novembro 2002,

**redaktotino por la sekva numero: la 15-a de januaro 2003.**

## SEKCIESTROJ

**Albanio:** Vasil Pistoli, c/o  
Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall.  
50, ap. 3, AL-Tirana ☐:  
selimib@albmail.com

**Argentino:** Teresita Alaniz,  
El Ombú s/n, AR-5801 Alpa Corral  
**Aŭstralio:** Kay Andersen,  
P.O. Box 186, Moorooka AU-  
4105 ☐: kjand@ozemail.com.au

**Belgio:** Raymond Wylleman,  
A. Vermeylenstr. 65, BE-8400  
Oostende  
☐: raymond.wylleman@pi.be

**Brazilo:** Elvira Fontes, Rua  
Machado de Assis 243, ap. 11,  
BR-04106-010 Sao Paulo (SP)

**Britio:** Grahame Leon-Smith,  
The Niven Suite, The Mansion,  
Ottershaw Park, Surrey, KT16 0QG.  
☐: grahame.leon-smith@free-  
computers.org

**Ĉeĥio:** Jana Melichárková,  
CZ-696 02 Ratiškovice 938  
☐: melicharkova@quick.cz

**Ĉinio:** Zhang Danchen,  
General Foreign Languages Dept., 29-  
34 North Park, Huazhong Normal  
University, CN-430070 Wuhan  
☐: zdchen@public.wh.hb.cn

**Finnlando:** Carola Antskog,  
Dragsfjärdvägen 690,  
FI-25700 Kimito  
☐: cantskog@kolumbus.fi

**Francio:** Joseph Catil,  
5, rue des Calabres,  
FR-69330 Meyzieu,  
☐: joseph.catil@wanadoo.fr

**Germanio:** Michael J.  
Scherer, Von Thürheimstr. 47,  
DE-89264 Weissenhorn

**Hungario:** József Németh,  
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász  
☐: jozefo@nl-papa.hu

**Irano:** Hamzeh Šafii, P.O.  
kesto 17765-184, IR-Teheran  
☐: ilei.ir@esperanto.org

**Italio:** Luigia Oberaucht  
Madella, via Prampolini 8,  
IT-43100 Parma  
☐: pianetaurano@libero.it

**Japanio:** Masumi Suzuki,  
Inokashira 3-5-12, Mitaka-shi, Tokio,  
JP-181-0001 ☐: masumi-  
s@gw3.gateway.ne.jp

**Katalunio:** Luz Vázquez,  
Apartado 553, ES-43200 Reus  
☐: ileicat@hotmail.com

**Kroatio/KEL:** Anika  
Jagnjić, Stubička 75,  
HR-10000 Zagreb,  
☐: anika.jagnjic@zg.tel.hr

**Kroatio/KEU:** Ivan Bekavac-  
Basić, Kušlanova 59,  
HR-10000 Zagreb

**Kubo:** Pedro Fernández  
Rodríguez, Requena No. 17 apto. 1  
entre S.Allende y Lugareño, Plaza,  
CU-10600 Ciudad de la Habana,  
☐: kubesp@ip.etcসা.com

**Nederlando:** Atilio Orellana  
Rojas, Riouwstraat 172,  
NL-2585 HW Den Haag,  
☐: ie1001@tiscali.nl

**Norvegio:** Björn Thuv,  
I.F. Gjerdrums vei 33  
NO-1396 Billingstad  
☐: bthuv@c2i.net

**Pollando:** Maria Majerczak,  
ul. Armii Krajowej 7, m. 122,  
PL-30 150 Krakow, ☎: (+ 48  
12) 638 14 49

**Rumanio:** Prof. Popa Florica,  
Str. Eroilor 29, ap.7.  
RO-1900 Timisoara

**Rusio:** Irina Gončarova,  
Moloeznaja 38-10, Odincovo 2,  
Mosk. obl. RU-143000  
☐: mirina@online.ru

**Svedio:** Bertil Andreasson,  
Södra Rörum pl. 455, SE-24294  
Hörby ☐: bertil.andreasson@  
horby.mail.telia.com

**Svislando:** Mirelle Grosjean,  
Grand-rue 9. Pf. 9,  
CH-2416 Les Brenets  
☐: mirelle.grosjean@rpn.ch

**Togolando:** Attiogbe-  
Agbemadon B., Mensah, T. I. E.  
To, B.P. 13169, Lome-TOGO,  
☐: esp.togo@cafe.tg

**Usono:** Doroteo Holland,  
5140 San Lorenzo Dr, Santa  
Barbara, CA 93111-2521 (US)  
☐: dorothyh@west.net

## REPREZENTANTOJ

**Armenio:** Lida Elbakjan,  
Moldovakan 26/2, kv. 52,  
AM-375062 Erevan  
☐: LIDELB@freenet.am

**Bosnio kaj Hercegovino:**  
Nimeta Kulenović, Branica Sarajeva  
15/V, BA-71000 Sarajeva

**Ĉilio:** Héctor Campos Grez,  
Casilla 231, Curicó, CL-Séptima  
Región ☐: strigo@cicreuna.cl

**Estonio:** Helgi Hromova,  
Pk. 623, EE-12602 Tallinn

**Islando:** Loftur Meiberg  
Sigurjónsson, Norðurbráut 33, 1.h.,  
IS-220 Hafnarfjörður,  
☐: loftur@skyr.is

**Israelo:** Murjan Josef,  
P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv

**Jugoslavio:** Radojica Petro-vić,  
Bul. oslobođenja 36, YU-32000  
Čačak : radp@ptt.yu

**Kongo DR:** Nangu Nduantoni-  
Bakidila,  
B.P. 13, CD-Lukala (Bas-Zaïre)

**Korea Resp.:** CHO Sung Ho,  
Department of Biology, Inha  
Universitato, Incheon 402-751,  
Koreio ☐: shcho@inha.ac.kr

**Kostariko:** Hugo Mora  
Poltronieri, Apartado 4981,  
CR-1000 San José  
☐: miaumiau1@racs.co.cr

**Litovio:** Algimantas Piliponis,  
Karolinisiu 3-93,  
LT-2044 Vilnius

**Nov-Zelando:** Gwenda Sutton,  
12C Herbert Gardens, 186 The  
Terrace, NZ-6001 Wellington 1  
☐: gwenda.s@ihug.co.nz

**Portugallio:** João Jose Santos  
Rua Damasceno Monteiro, 21-B r/c  
dto.PT-1170-109 Lisboa  
☐: mqsantos@iol.pt

**Slovenio:** Marija Zlatnar-Moe,  
Miličinskega 66, SI-1000 Ljubljana.  
☐: Marija.Zlatnar@guest.arnes.si

**Ukrainio:** Nina Daniljuk,  
prospekt Sobornosti, 32-108, Luck-  
26, UA-43026

**Uzbekistano:** Eugenio S.  
Pervertajilo, Ab. kesto 140, UZ-  
700000 Taškent, CIS  
☐: eugeny@esper.gimli.com

**Venezuelo:** Andrés Turrisi,  
Cen.Res.Puerta del Este.Torre, Oeste,  
piso15, ap.153, Av.Madrid, VE-1070  
La California Norte, Caracas  
☐: andesp@internet.ve